

1979 januaro

72-a jaro


n-ro 877(1)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



1979



Internacia
Jaro de la Infano

Vi trovos

ĉi tiun numeron frue en via poŝtkesto. Ni iom rapidis, ne nur por tiel bon-aŭguri la novan jarkolekton, sed ankaŭ por igi vin definitive forgesi kaj pardoni al ni la malfruigon de la lastaj tri numeroj en 1978. Dankon, ke vi tiurilate restis nur ĉe eventualaj grumbloj kaj ne decidiĝis skribi plendi kaj admoni! La enhavo de la numero estas nek tro statuta, nek aparte spicita (aŭ diluita) per aliaj oficialaĵoj. Ĝi estas, ni diru, sufiĉe ordinara, normala, senekscesa numero, kun materialo varia laŭ niaj ebloj. Cetere, vi verŝajne eĉ ne rimarkis, ke per ĉi tiu numero la redaktoro iasence komencas sian sesan jarkolekton de ĉi tiu revuo. Li plendis lastatempe, ke li en tiuj pasintaj kvin jaroj ne sukcesis produkti eĉ unu solan numeron, kiu plene kontentigus lin kaj eventuale ankaŭ la legantojn. Li do ankoraŭ havas ambiciojn en ĉi tiu revuo. Tial li restas kaj minacas eble jam ĉi-jare produkti tiun ĥimeran idealan revunumeron. Ni vidu! Sed, eĉ se li ne atingos sian idealon en 1979 — okazu tio al vi mem!

Enhavo

- 1 Novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA: 1979 — por nova lingva ordo (Humphrey Tonkin)
- 2 1979 — Internacia Jaro de la Infano: Investo por la estonteco (Lennart Åberg)
- 3 Okaze de la centjara datreveno de "Lingwe Uniwersala": Leo Wiener, pioniro de pra-Esperanto (Bernard Golden)
- 4 Ĉinaj esperantistoj en Jugoslavio: Ĉino parolas pri la ĉina Movado (Jim Cushing)
- 7 Instruado: Duagrada kurso en Aix-en-Provence; Koresponde en Kanado; Bibliografio: Ni denove mankas en konsultolibroj (Richard E. Wood)
- 8 Letero el Estonio: Defende al Hendrik Adamson (Hilda Dresen, Jaan Ojalo, Henrik Seppik)
- 9 En februaro, la dekan fojon: Semajno de Internacia Amikeco (Anna Brennan); Kalendaro aperos en marto
- 10 Recenzoj: "Ĝis nun; Poemoj originalaj" (Péter Rados); "La socia romano en Esperanto" (Vilmos Benczik); "La libro de la amo" (Rikardo Ŝulco); "Estona soveta poezio" (Baldur Ragnarsson); "Santos Vega" (Pierre Ullman); "Optimala ortografio de la internacia lingvo Esperanto" (Boris Kolker)
- 12 Laste aperis. . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 13 TEJO-paĝo: 35a Internacia Junulara Kongreso de TEJO: Kongreso okazos en arbaro (Anna Brennan)
- 14 Kongresa komuniko (novaĵoj pri la 64a Universala Kongreso en 1979)
- 16 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 18 Oficiala informilo el la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio; Ekzameno E (B. Golden)
- 19 Anoncetoj
- 20 Esperanto en radio (kompleta tabelo)

La kovrilo

La miro en la grandaj okuloj de la knabino en Srilanko rilatas la — ne diru! — rondecon de la Tero. Tiel diris la instruistino, kiu permesis eĉ iom ludi kun la terglobo kaj aŭskulti, kio okazas ene de ĝi. Ni ŝuldas ĉi tiun foton al UNICEF, dum la srilanka lernejo ŝuldas sian terglobon kaj multajn aliajn instruhelpilojn al tiu specialigita porinfana organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj. Sed la knabo en la angulo, kion pri li?! La venton en lia hararo kaj la pozon de tiu eta heredonto de Herbert von Karajan kaptis la foto de Zdravko Nikolov el Veliko Tarnovo, Bulgario. La geknaboj sur la kovrilo inaŭguras la Internacian Jaron de la Infano, pri kio vidu ankaŭ nian paĝon 2.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 86 landoj.

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendaro jaro: 33,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 55,— gld). Unuopa ekz. 3,— gld.

Anonctarifo: 1p. 500 gld. 1/2p. 265, 1/4p. 145, 1/8p. 85, 1/16p. 55 gld. Nemovadaj komercaj entreprenoj pagas duoble. Anoncoj sur la ekstera kovrilpaĝo kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj la Financa Programo: d-ro Humphrey Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050, Usono; telefono (215) 259 8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri informado kaj kulturo: mag. William Auld, 20 Harviestoun Road, Dollar, Clacks., FK14 7HG, Britio; telefono (02594) 2339.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado kaj la delegita reto: prof. d-ro Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; telefono (02) 44 80 85.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri planado: d-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-2050 Hamburg 80, FR Germanio; tel. (040) 7384508.

Estrarano pri landa kaj regiona agado: s-ino Ursula Grattapaglia, Caixa Postal 04-0097, BR-70000 Brasília, Brazilo.

Estrarano pri administrado, financoj kaj specialaj taskoj: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, Belgio; telefono (050) 35 49 35.

Estrarano pri edukado: s-ro Andrzej Pettyn, skr. poczt. 46, PL-05-710 Milańówek, Pollando; tel. 58-37-08.

Estrarano pri kongresoj kaj turismo: d-ino Flora Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII.22., H-7624 Pécs, Hungario.

1979 — por nova lingva ordo

KVANKAM ideoj de elementa justeco enpenetris diversajn aspektojn de la homa vivo, ili ne enpenetris ĉiujn. Bazaj principoj de rasa egaleco estas hodiaŭ larĝe akceptitaj, eĉ se ili ne estas ĉiam aplikataj. Vastigas principoj de seksa egaleco, kaj de religia. Sed la lingva egaleco ankoraŭ postrestas.

En la nunaj tagoj en multaj landoj oni festas la tridekan datrevenon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. UEA mem deklaris la periodon de la 10a ĝis la 15a de decembro Semajno de Homaj Rajtoj kaj Esperanto. Landaj kaj lokaj Esperanto-organizaĵoj kunlaboras por fari specialajn aranĝojn dum tiu Semajno, per kiuj ili donas apartan atenton al la Universala Deklaracio kaj aliras la publikon por emfazi ĝiajn lingvajn aspektojn.

Tiuj lingvaj aspektoj de la Deklaracio estas relative neglektataj. Diskriminacio kontraŭ homoj nur pro la lingvo, kiun ili parolas, estas tre ofta hodiaŭa fenomeno. Eĉ la grandaj internaciaj organizaĵoj aplikas lingvan diskriminacion en la propra laboro kiam ili favoras certajn lingvojn kaj malatentas aliajn. En sia



1979: Ni laboru kaj esperu havi fruktodonan jaron!

insistado pri lingva egaleco, Universala Esperanto-Asocio laboras por severe neglektata aspekto de la homa justeco, kiu estas eksplicite menciita en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.

En la morgaŭa mondo la simplaj fizikaj bezonoj, la interrilato de la monda ekonomio, la denseco de la homa komunikado — ĉio ĉi igos la diversajn naciojn ne plu sendependaj sed interdependaj. Tiu epoko jam

alvenadas. Por konservi la diversecon de la kulturoj, la diversajn alirojn al la homaj feliĉo kaj justeco, oni bezonas homan komunikilon, kiu ne favoras unu nacion super alia sed traktas ĉiujn egalaj. Oni bezonas lingvon, kiun oni povas lerni relative facile, sed kiu kapablas esprimi ĉion lingve esprimeblan. Oni bezonas lingvon, kiu povas ligi la ordinarajn civitanojn de la mondo, do ne nur la elitojn, per senperaj ligiloj.

La morgaŭa mondo povus enteni la promeson de tutmonda lingva komunikado por ĉiu civitano. La Internacia Lingvo Esperanto estas la hodiaŭa garantio de tiu morgaŭa ebleco.

Por lokaj kaj naciaj bezonoj ni uzu lokajn kaj naciajn lingvojn; ja ĉiu lingvo havas sian rolon. Sed por internacia komunikado ni uzu unuavice la efikan kaj jam elprovan Internacian Lingvon. Ĝi ne forigu la naciajn lingvojn, sed konservu ilin en nova lingva ordo.

En la laboro por Esperanto la jaro 1978 estis brila jaro. La Universala Kongreso de Esperanto ĉi-jare renkontigis 4 400 homojn el kvindek da landoj en la dua plej granda kunveno en la tuta historio de la lingvo. En multaj mondopartoj novaj grupoj de homoj aŭdis la novaĵon de Esperanto kaj eltrovis ĝian utilon kiel rimedo por vera internaciismo kaj kiel forta apogilo de la paco. Aliaj komencis utiligi ĝin por pure praktikaj bezonoj — en universitatoj, en komerco, en vojaĝado, por faciligi internaciajn kontaktojn. La kresko de intereso pri Esperanto en Latinameriko estas bona ekzemplo de tiu nova kaj instiga dinamismo.

La kreskanta atento al Esperanto estas tuj komprenebla. En mondo, kiu perdadas siajn idealojn, ĝi prezentas bonan kaj indan idealon. En mondo, en kiu la transnacia komunikado intensiĝas, kaj la bezono alpreni teknikojn kaj sciojn el aliaj landoj kreskas, Esperanto prezentas perfekte simplan solvon.

Necesas, ke la jamaj parolantoj de Esperanto kune laboru en konscia harmonio por alporti al pli da homoj tiun ĉi modernan miraklon de la komunikado. Ni ĉiuj havas niajn diversajn alirojn al mondaj problemoj, al politiko, al sociaj demandoj, eĉ al persona filozofio — sed unuigas nin la lingvo, kiun ni parolas. Tio estas potenca kaj nedisigebla ligilo.

La jaro 1979 estas promesplena jaro. Esperanto kaj la laboro por Esperanto intensiĝas, firmiĝas, kaj — eble plej grave — disvastiĝas vere tra la tuta mondo. La atingoj de 1978 daŭru kaj duobliĝu tra 1979. Tio okazos, se ni tenos nin firme je la celo kaj en ĉiuj niaj rilatoj kun aliaj homoj ne forgesos tiun celon — la senperan, egalecan, internacian lingvan komunikadon.

Zamenhof-Tago 1978

Humphrey Tonkin

Investo por la estonteco

La Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj proklamis la jaron 1979 Internacia Jaro de la Infano. Kiel la estonteco ĝenerale, tiel ankaŭ la fina sorto de la Internacia Lingvo, ĝiaj plua disvastiĝo, evoluo kaj tutmonda rekono, evidente dependos de la infanoj, de la junularo, de la novaj generacioj. Estas ni – konsciaj plenkreskuloj, gepatroj, instruistoj kaj sociaj respondeculoj –, kiuj konstante devas doni nian senrezervan apogon kaj helpon al la infanoj. Nur tiam ni rajtas fidi kaj esperi bonon pri estonteco, kiu havos lokon ankaŭ por nia lingvo.

EN LA MONDO vivas pli ol 1 500 000 000 da infanoj sub la aĝo de 15 jaroj. Ili kune konsistigas pli ol trionon de la homaro. Tri kvaronoj de tiuj infanoj vivas en la malriĉaj partoj de la mondo, en la t.n. evolulandoj. Tiuj junaj homoj iras renkonte al la vivo sub tre malsimilaj cirkonstancoj. Oni supozas, ke hodiaŭ pli ol 200 milionoj da infanoj neniam havos la bonŝancon de fundamenta edukado, t.e. lerni legi, skribi kaj kalkuli. En la mondo, entute 500 milionoj da infanoj estas konstante sub minaco de malsano, pro manko de nutraĵoj: inter ili duono ĝuste nun suferas pro gravega subnutrado.


Unuiĝintaj Nacioj jam ekde sia estiĝo en 1945 agas por plibonigi la vivkondiĉojn de la infanoj. En 1946 fondiĝis UNICEF, specialigita porinfana organizaĵo. Tiam la urĝa tasko unuavice celis helpon al la infanoj en la milite detruitaj landoj, sed pli poste UNICEF direktis sian laboron al la infanoj en la evolulandoj.

EL LA DEKLARACIO PRI LA RAJTOJ DE LA INFANO:

Principo 1: La infano devas ĝui ĉiujn rajtojn formulitajn en ĉi tiu Deklaro. Ĉiu infano, sen ia ajn escepto, posedas ĉi tiujn rajtojn, sen distingo aŭ diskriminacio pro la raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵo, naskiĝo aŭ alia stato, ĉu propra aŭ familia.

Principo 10: La infanon oni protektu kontraŭ praktikoj, kiuj povas stimuli rasan, religian aŭ iun ajn aliforman diskriminacion. Ĝi grandiĝu en etoso de kompreniĝo, tolerado, amikeco inter popoloj, paco kaj universala frateco, kaj en la plena konscio, ke ĝiaj energio kaj talentoj devus dediĉiĝi al la servado por la kunhomoj.

La bazo por la agado inter la infanoj estas la Deklaracio pri la Rajtoj de la Infano, akceptita jam en 1924 en la tiama mondorganizaĵo Ligo de Nacioj. Tiu Deklaracio, reviziita kaj plivastigita, poste estis akceptita de UN la 20an de novembro 1959. La Deklaracio per siaj dek Principoj klare esprimas kaj konfirmas ĉion, kio devus kaj devas aparteni al la fundamentaj rajtoj de ĉiu infano, ĉie en la mondo. Temas pri sociala sekureco (ekzemple: sufiĉa kaj kontentiga nutrado, loĝejo, prizorgado de la sano), pri rajto kreski en atmosfero de amo kaj sekureco familia, pri la rajto esti protektata kontraŭ ĉiuj formoj de misflegado, krueleco kaj ekspluatado. Ni citas ĉi tie (v. enkadrigitan tekston) la unuan kaj lastan Principojn de la Deklaracio. Lige al la Deklaracio pri la Rajtoj de la Infano, UN direktas apartan admonon al la gepatroj, unuopuloj, societoj, lokaj aŭtoritatoj kaj registaroj rekoni la proklamitajn liberecojn kaj rajtojn kaj aspiri je la aplikado de ili. Kion vi mem povas fari ĉi-rilate? Ni permesas al ni fari kelkajn sugestojn: Partoprenu aranĝojn okaze de la Internacia Jaro de la Infano en via urbo, loko. Kontaktu vialandan asocion de UN-klubo (ankaŭ lokajn organizaĵojn) aŭ la landan Informcentron de UN. Agadu en vialanda Esperanto-asocio, en loka klubo; aranĝu programojn pri la Internacia Jaro. Petu materialon (informilojn, afiŝojn, diapozitivajn bildseriojn, filmojn) de via UN-asocio aŭ landa komitato de UNICEF. Tiel vi kontribuos favore al la Internacia Jaro de la Infano kaj al la Internacia Lingvo Esperanto. **Lennart Åberg**



Feliĉo radias el la vizaĝo: Oni strebu ĉi tion por ĉiuj infanoj de la mondo. (La foto de Leila Kantonen, Finnlando, gajnis la Unuan Premion en la Belartaj Konkursoj 1978).



Leo Wiener: Ĉu al li apartenas la titolo de la unua esperantisto?

Leo Wiener, pioniro de pra-Esperanto

EN INTERESVEKA ARTIKOLO, aperinta en tiu ĉi revuo en 1977, N.Z. Maimon priskribis la agadojn de unu el la pioniroj de la Esperanto-movado, la hebrea verkisto Naĥum Slouŝc. La aŭtoro karakterizis Slouŝc, kiu estis inter la unuaj mil homoj, kiuj lernis Esperanton, kaj kiu mortis 94-jara en 1966, kiel "eble la plej frua, plej longe vivanta disĉiplo de Zamenhof" (Maimon, 1977, p. 132). La fakto, ke Slouŝc estis la plej longe vivanta disĉiplo de Zamenhof estas nediskutebla, sed mi tre dubas, ke oni povas pravigi la aserton, ke li estis la plej frua apoganto de la internacilingvaj ideoj de Zamenhof. Eĉ se Slouŝc lernis Esperanton el la *Unua libro*, antaŭ ol la preseja inko sur ĝiaj paĝoj estis seka, li malfruis.

La *Unua libro* de d-ro Esperanto estis publikigita en julio 1887, kaj tuj kiam ĝi estis metita en la montrofenestrojn de librovendejoj, pluraj homoj aĉetis ĝin kaj komencis lerni la Internacian Lingvon. Inter ili estis Leo Belmont, Antoni Grabowski kaj Aleksandro Dombrovski. Kiu serĉas la plejplej fruan disĉiplon de Zamenhof devas retroiri en la pasinteco, al la tempo **antaŭ** la eldono de la *Unua libro*, ĉar Esperanto jam estis preta en 1885, kiam Zamenhof komencis serĉi eldoniston (Leono Zamenhof, 1921, p. 17).

Unue, mi povas proponi kiel kandidatojn por tiu tre frua disĉipleco familianojn de Zamenhof. Aleksandro Zilbernik kaj lia filino Klara financis la eldonon de la unua broŝuro pri Esperanto, kaj tio okazis antaŭ la geedziĝo de Klara kaj Ludoviko. Ĉu la bopatro kaj fianĉino ne tiutempe informiĝis pri la lingva projekto kaj filozofio de Zamenhof kaj eble eĉ komencis lerni Esperanton? "Malgraŭ la maljuna aĝo li tute ellernis Esperanton", sciigas *Enciklopedio de Esperanto* (p. 491) pri Aleksandro Zilbernik, sed tiu fonto ne precizigas la daton. Laŭ Holzhaus (1969, p. 260), la jaro estis 1887, la sama por la esperantistiĝo ankaŭ de Klara. Laŭ Petrulis (1971, p. 14), ili estis la unuaj esperantistoj en Kaunas (Kovno). Fakte, Klara estus povinta esti pli frua varbito por Esperanto, ekde la unua intervidiĝo kun Ludoviko, kiu eble okazis plej frue ĉe la fino de 1884 (Maimon, 1978, p. 122).



Gimnaziano L.L. Zamenhof en la jaro de "Lingwe Uniwersala", 1878

Inter la gefratoj de Zamenhof, tri, Felikso, Leono kaj Aleksandro, fariĝis esperantistoj. Surbaze de donitaĵoj en la fruaj *Adresaroj*, Leono kaj Aleksandro esperantistiĝis en 1898, kaj Felikso en 1887 (Holzhaus, 1969, p. 263-264). Tamen, Edvardo Wiesenfeld, la redaktinto de la verkoj de Felikso Zamenhof, supozas, ke jam antaŭ 1887 la plej aĝa frato de Zamenhof komencis lerni Esperanton kaj ankaŭ verki originale en la lingvo (Felikso Zamenhof, 1935, p. 8).

Estas eble fari ankoraŭ unu paŝon pli profunde en la historion, ne de Esperanto, sed de pra-Esperanto. Zamenhof nomis sian unuan planlingvan projekton **Lingwe Uniwersala** kaj prezentis ĝin dum festo en sia hejmo la 17an de decembro 1878. (En kelkaj fontoj la dato estas la 5a de decembro, laŭ la malnovstila Julia kalendaro). Antaŭ precize cent jaroj estis publike elparolitaj la unuaj vortoj en tiu frua dialekto de Esperanto. La sola teksto de **Lingwe Uniwersala**, kiu ekzistas hodiaŭ, estas la unua strofo de himno pri frateco:

*Malamikete de las nacjes
Kadô, kadô, jam temp' estâ!
La tot' homoze in familje
Konunigare so debâ.*

Zamenhof tradukis ĝin jene en Esperanton: *Malamik-eco de la nacioj / falu, falu, jam tempo estas! / La tuta homaro en familion / unuigi devas* (Zamenhof, *Originala verkaro*, 1929, p. 420).

Partoprenis en tiu solenaĵo de la Tago de Vivigo de la Universala Lingvo la familianoj de la 19-jara Ludoviko, krom lia patro, kaj "ses aŭ sep" entuziasmaj gimnazianoj kaj amikoj, kiuj lernis la lingvon (Privat, 1967, p. 36; Boulton, 1962, p. 29-30). Kiuj estis tiuj festantoj, kaj kio estas direbla pri ilia esperantisteco? La patrino Liba (Rozalia), kvankam ŝi estis simpatianto de la ideoj de sia filo, plej verŝajne neniam lernis **Lingwe Uniwersala**-n aŭ Esperanton. Marko Zamenhof, la patro, kiu ne ĉeestis la feston, tiutempe estis tre skeptika pri la valoro de la planlingva okupiĝo de sia filo. Ne estas atestaĵoj, ke la du fratinoj, Fania, 16-jara, kaj Aŭgusta, 14-jara, aktive interesiĝis pri la lingvokrea agado de sia frato. En 1878 la fratoj Henriko, Leono

kaj Aleksandro estis tro junaj por lerni **Lingwe Uniwersala**-n. Restas nur la dekjarulo Felikso, kiu jam frekventis kiel unuaklasano la saman gimnazion, en kiu Ludoviko estis en la oka, lasta klaso. Li estis sufiĉe matura por entrepreni lingvolernadon; en siaj rememoroj li mencias, ke post la apero de Volapuko, li studis tiun lingvon kune kun siaj kolegoj (Felikso Zamenhof, 1935, p. 193). Estas tre probable, ke tiuj kolegoj de la 1880-aj jaroj estis ankaŭ anoj de la rondo de **Lingwe Uniwersala**. Felikso do, denove fariĝas kandidato por la honoro esti la unua disĉiplo aŭ, por tiel diri, pradisĉiplo de sia frato. Sed li havas rivalojn por tiu titolo inter la aliaj junuloj, kiuj formis tiun malgrandan grupon de **Lingwe Uniwersala**-istoj. En sia kongresa parolado en Ĝenevo, en 1906, Zamenhof menciis "rondeto da junaj diversgentaj gimnazianoj", kaj Maimon (1978, p. 40) atentigas pri la signifa fakto, ke en tiu grupo estis ne nur judaj, sed ankaŭ kristanaj konatoj. Kiuj estis tiuj pra-esperantistoj?

Unu estis Aleksandro Waldenberg, varsoviano, kiu poste lernis la klasikan Esperanton. Li studis la medicinon ĉe la Universitato de Varsovio kaj praktikis kiel kuracisto en la sama urbo (*Enciklopedio de Esperanto*, p. 443, 572). En 1906 li estis la sekretario de la unua homarana (hilelista) rondo (Zamenhof, *Leteroj*, 1948, vol. 1, p. 261; Zamenhof, *Originala verkaro*, 1929, p. 554). En postaj jaroj Waldenberg verŝajne forlasis la Movadon, ĉar en 1937, en la *Ora libro de la Esperanto-movado* (p. 66) aperis demando pri tiu "kunlerninto kaj konfidulo" de Zamenhof: "Kie li estas, se li vivas?"

Maria Ziołkowska (1959, p. 42) en sia romansimila biografio de Zamenhof rakontas, ke inter la amikoj de Zamenhof estis iu Jentys, sed nek en tiu verko nek aliloke mi sukcesis trovi pli da biografiaj detaloj pri tiu ombreca figuro. Li ja povas esti fikcia elpensajo de la aŭtorino, samkiel aliaj rolantoj en tiu libro.

Lastatempe mi malkovris informojn pri alia forgesita pioniro de la Esperanto-movado. Li estas Leo Wiener (1862-1939), kiu lernis **Lingwe Uniwersala**-n kaj partoprenis en la solenaĵo de la 17a de decembro antaŭ unu jarcento. Dank' al liaj propraj rememoroj, publikigitaj kiel gazetartikoloj en 1910, kompletigitaj per multaj faktoj en la aŭtobiografio de lia filo, estas eble desegni tre detalan vortportreton pri li (Leo Wiener, 1910?; Norbert Wiener, 1964).

Leo Wiener naskiĝis en 1862 en Bjalistoko, la sama urbo en kiu Ludoviko Zamenhof naskiĝis tri jarojn pli frue. Povas esti, ke Wiener kaj Zamenhof konatiĝis kiel infanoj en sia naskiĝurbo. En 1873 la familio de Zamenhof transloĝiĝis al Varsovio, kaj Ludoviko sukcesis eniri unu el la tieaj gimnazioj. Leo Wiener komencis sian mezgradan edukon en Minsk, sed en 1877, ankaŭ li iris al Varsovio. Tiam la du eksbjalistokanoj amikiĝis, kvankam ili ne frekventis la saman lernejon. En la komenco, la postgimnaziaj karieroj de Zamenhof kaj Wiener iris paralele, sed poste la du amikoj daŭrigis sur malsamaj vojoj. Ambaŭ junuloj intencis prepari sin por la kuracista profesio. En 1879 Zamenhof ekstudis ĉe la Universitato de Moskvo, dum Wiener fariĝis studento en la Medicina Fakultato de

ĈINAJ ESPERANTISTOJ EN JUGOSLAVIO:

Ĉino parolas pri la Ĉina Movado

NOVAĴOJ pri Esperanto kaj Ĉinio lastatempe konstante plimultiĝas. Freŝa ero en la serio estas la vizito al Jugoslavio de du gelaborantoj de la redakta stabo de *El popola Ĉinio* — dum pli ol dudek jaroj unu el la plej vaste konataj gazetoj en Esperanto. Akompanante la pupteatran trupon el Pekino, kiu partoprenis la Pupteatran Internacian Festivalon en Zagreb (v. la novembran numeron, p. 194), s-ro Tan Hiuĝu kaj s-ro Zoŭ Guohiang petis okazon intervidiĝi kun jugoslavaj legantoj de EPC.

Aranĝite de Marinko Ĝivoje, unu el la perantoj en Jugoslavio de EPC, tiu renkontiĝo okazis la 9an de oktobro en Zagreb. Post bonveniga parolado de s-ro Ĝivoje, s-ro Zoŭ diris, interalie: "...Nia pupteatra trupo prezentas teatraĵojn en Esperanto. En la komenco nia kultura ministrejo ricevis inviton kaj interkonsiliĝis kun la redakto de *El popola Ĉinio*: ĉu oni

povas prezenti teatraĵon en Esperanto? Ni diris, ke ni provu — ke unue ni devas provi kaj poste ni vidos la aferon. Post unumonata lernigo al la geaktoroj, Esperanto multe interesis ilin, kaj ili pli kaj pli diligente lernis ĝin. Kvankam nun ili parolas ne tiel flue, ne tiel bele, tamen ili kuraĝas uzi Esperanton por akceli la amikecon kaj interkompreniĝon inter niaj du popoloj kaj esperantistoj de niaj du landoj.

Nia redakto ĉefe zorgas pri la eldonado de la revuo, dum Ĉina Esperanto-Ligo ĉefe zorgas pri la Esperanto-movado en nia lando, kaj ankaŭ zorgas pri internaciaj kontaktoj. Pri iuj gravaj temoj la redakto interkonsiliĝas kun la Ligo, sed ne pri ĉiuj aferoj... En la redakto laboras dudek personoj, eble iom pli, kaj tio inkluzivas fotistojn, kiuj ne multe uzas Esperanton. La plejmulto de artikoloj en nia revuo estas tradukita el la ĉina lingvo. Malmulte da artikoloj estas verkitaj rekte en Esperanto. Tial eble troviĝas en nia revuo multaj vortoj malfacile kompreneblaj por fremdulo. La nombro de niaj legantoj atingas dek mil, inkluzive mil legantojn en Ĉinio. En la lastaj jaroj ni faris klopodojn por plibonigi nian revuon... Ho! Niaj artikoloj estis tro politikemaj. La nombro de abonantoj iom malaltiĝis. Por la venonta jaro nun denove plimultiĝas ĝi. Ni pensas, ke ni devas tre bone funkciigi nian redak-

Varsovio, en 1880. Konstatinte, ke li havas nek talenton nek emon por la medicino, Wiener vojaĝis al Germanio kaj eniris la Politeknikan Instituton en Berlino, en 1881, kun la celo fariĝi inĝeniero. Intertempe, Zamenhof, pro financaj malfacilaĵoj, reiris al Varsovio, en 1881, por fini sian studadon ĉe la tiea universitato, kaj en 1885 li ricevis la kuracistan diplomon.

Kiam tio okazis, Leo Wiener jam forlasis la inĝenieran kurson kaj ankaŭ Eŭropon. Fariĝinte vegetarano dum sia restado en Germanio, li projektis la fondon de utopia kolonio de samcelanoj en Brita Honduraso (Belizo), sed la plano fiaskis surmare pro manko de akordo inter Wiener kaj lia partnero. Anstataŭ iri ĝis la Centra Ameriko, la senmona 20-jarulo elŝipiĝis en Nov-Orleano, Usono, en 1882. Dum la sekvaj jaroj Wiener vagadis tra la suda kaj meza partoj de tiu lando, farante diversspecajn laborojn. Kvankam la terkultivado tre altiris lin, tiu okupo ne povis kontentigi la intelektan flankon de lia personeco. Li finfine trovis sian ĝustan profesion, la instruadon. Unue li instruis la matematikon en mezlernejo de Kansas City, Misurio. Poste, de 1892-1895, li estis vic-profesoro pri ĝermanaj kaj latinidaj lingvoj ĉe la Universitato de Misurio. Irinte al la orienta parto de Usono, li fariĝis instruisto pri lingvoj en la Nov-Anglia Muzika Konservatorio en Bostono, en 1895-1896. Samtempe, li dediĉis sin al filologiaj esploroj tradukante serbajn baladojn. En 1896 li translokiĝis al Kembriĝo kaj fondis la fakon pri slavaj lingvoj kaj literaturo ĉe la Universitato Harvard. Ĝi estis la unua fako pri la slavistiko en usona

universitato. En 1911 li estis nomita universitata profesoro kaj li tenis tiun oficon ĝis sia emeritiĝo en 1930. Estas menciinde, ke en 1894 Leo Wiener fariĝis la patro de Norbert Wiener, la plej eminenta usona matematikisto de la 20a jarcento kaj la fondinto de la kibernetiko.

Leo Wiener estis multsciulo kaj ne limigis sin je la slava filologio aŭ la hindeŭropa lingvistiko; li studis ankaŭ afrikajn bantuajn lingvojn kaj lingvojn de la indianoj en la Centra Ameriko. Samkiel Zamenhof, ankaŭ li interesiĝis pri la jida lingvo, kaj li verkis historion pri la jida literaturo de la 19a jarcento. Li kontribuis etimologie al granda usona vortaro kaj kompilis antologion de la rusa literaturo. Wiener estis simpatianto de la filozofio de Tolstoj kaj tradukis ties tutan verkaron — 24 volumojn — en la anglan lingvon. Aliaj libroj verkitaj de Wiener temis pri kontaktoj inter Afriko kaj Ameriko antaŭ la tempo de Kolumbo, mezepokaj ĝermanaj leĝoj, la historio de arabo-gota kulturo kaj la deveno de la majaoj kaj meksikanoj. Li okupiĝis ankaŭ pri la historio kaj folkloro de la ciganoj kaj publikigis matematikajn artikolojn. Sed, laŭ mia scio, li verkis nur du artikolojn pri la internacilingva demando, ambaŭ en la germana lingvo: "Universal-sprachen" kaj "Das Esperanto" aperis en 1907 en la berlina periodaĵo *Internationale Wochenzeitschrift für Wissenschaft, Kunst und Technik*.

Post lia alveno en Usono, la interesiĝo de Leo Wiener pri planlingvoj malkreskis. Tion li mem konfesis al Otto Jespersen, la eminenta dana filologo kaj inter-



S-ro Zoŭ Guohiang (meze), kun nia raportanto (maldekstre) kaj s-ro Franjo Vokoun, dum la renkontiĝo en Zagreb.

tejon por la amikeco kaj kompreniĝo inter la popoloj. Kiel ni povas atingi nian celon? Ni devas bone uzi Esperanton! Sed redaktado estas arto, ne simpla afero. Kiel ni povas kontentigi la postulojn de niaj legantoj? ... Nun ĉiuj kuraĝas multe labori kaj fari siajn klopodojn por pli bone funkciigi nian redakcion. Ankaŭ la Ĉina Esperanto-Ligo nun planas restarigi iujn aktivadojn... ekzemple, fari proponojn al la eduka ministerio por instrui Esperanton en lernejoj. Nun iuj Esperanto-kursoj funkcias en mezlernejoj sub zorgado de unuopaj Es-

peranto-instruistoj, sed ne organizite. En la pasintaj dekelkaj jaroj la Esperanto-movado en Ĉinio troviĝis preskaŭ en stagnado. Krome, ni regule eldonas la revuon, elsendas Esperante Radio Pekino kaj la Esperanta Sekcio de Fremdlingva Eldonejo eldonas librojn." Sekvis unuhora diskuto kun legantoj de EPC, kiuj esprimis siajn opiniojn pri diversaj aspektoj de la gazeto. Tuj poste la ĉinajn gastojn akompanis delegitaro de Kroatia Esperanto-Ligo al akcepto ĉe la prezidanto de la Komisiono por Eksterlandaj Rilatoj de la Socialisma Unuiĝo (la plej amasa socipolitika organizaĵo en Kroatio). En la unuhora interparolo oni interŝanĝis informojn pri la pozicio de esperantistaj organizaĵoj en Ĉinio kaj Jugoslavio. La gastoj el Ĉinio i.a. informis, ke Ĉinio antaŭ deko da jaroj havis ĉirkaŭ 500 registritajn membrojn de la Ĉina Esperanto-Ligo, sed nuntempe ne disponeblas preciza statistiko, ke EPC, kun ĉirkaŭ 700 abonantoj en Jugoslavio, estas tre grava ligilo inter la du landoj ĉar adekvata revuo en la jugoslavaj lingvoj ne aperas; por ĉinaj esperantistoj estis tre grava la antaŭnelonga mencio en la ĵurnalo *Renmin Ribao*, ke la jugoslava prezidanto Tito lernis Esperanton; la okazo partopreni en la Pupteatra Internacia Festivalo en Esperanto ankaŭ grave helpas al ĉinaj esperantistoj por fari novajn planojn.

Jim Cushing

lingvisto, kiu vizitis Harvard dum sia restado kiel gast-profesoro en Usono, en 1909-1910 (Jespersen, 1977). Cetere, la nomo de Wiener ne ligiĝas al iuj el la eventoj en la frua historio de la usona Esperanto-movado, kvankam ĉirkaŭ li okazis diversaj Esperantaj agadoj: la unua loka klubo en Usono estis fondita en Bostono en 1905; Wilhelm Ostwald, la Nobel-premiita germana kemiisto estis gastprofesoro ĉe Harvard kaj propagandisto por Esperanto en 1905-1906; la 18-jara svisa esperantisto Edmond Privat, prelegvojaĝante en Usono, vizitis Harvard en 1908; la unua usona kongreso estis organizita ĉe la Lago Chautauqua en la ŝtato Nov-Jorko en 1908; kaj d-ro Zamenhof, la knabaĝa amiko de Leo Wiener, venis al Usono en 1910 por partopreni en la 6a Universala Kongreso en Vaŝingtono.

Resume, la rolo de Leo Wiener en la historio de la Esperanto-movado estis mallonga sed signifplena. Li, kune kun la aliaj gimnazianoj, kiuj entuziasmiĝis pri **Lingwe Uniwersala** kaj interparoletis en tiu lingvo, donis al la juna Ludoviko konvinkan pruvon de la funkciebleco de planlingvo, kaj tiel Zamenhof estis kuraĝigita pliperfektigi sian lingvon. Eĉ se tiuj "estontaj apostoloj de la lingvo" plejparte disiĝis post la neforgesebla festotago kaj ne fariĝis adeptoj de la klasika Esperanto de 1887, tamen ili meritas mencion en la historio de la Movado. Espereble, esperantologoj kaj movad-historiistoj estontece malkovros informojn pri la aliaj **Lingwe Uniwersala**-istoj por kompletigi tiun ĉi skizan prezenton kaj registri la faktojn en la nova eldono de *Enciklopedio de Esperanto*.

Kiel nun respondi la demandon: kiu estis la plej frua disĉiplo de Zamenhof? Tio certe ne estis Naĥum Slouŝĉ. La plej frua disĉiplo devas esti unu el la adeptoj de **Lingwe Uniwersala**, sed kiu? Estas malfacile ekscii, kiu el la gimnaziaj kolegoj de Ludoviko estis la unua, kiu lernis tiun lingvon. Ĉu Aleksandro Waldenberg? Ĉu Leo Wiener? Ĉu alia tute forgesita pioniro? Ĝis estos prezentitaj kontraŭaj atestaĵoj, ŝajnas, ke nur Felikso Zamenhof povas pretendi absolutan antaŭecon, ĉar en tiu rondo de pra-esperantistoj li ja estis la plej proksima al sia frato.

Bernard Golden

NOTO; Ĉi tiu kontribuaĵo estis planita por apero en la decembra numero, sed aliaj materialoj malhelpis tion.

BIBLIOGRAFIO

- BLEIER, Vilmos / CENSE, Eugénie Françoise (redaktoroj) 1937 *Ora libro de la Esperanto-movado 1887-1937*. Warszawa.
- BOULTON, Marjorie Zamenhof, aŭtoro de Esperanto. La Laguna, Hispanio. 1962
- HOLZHAUS, Adolf *Doktoro kaj lingvo Esperanto*, Helsinki. 1969
- JESPERSEN, Otto "Meine Arbeit für eine internationale Sprache". Tradukita el Novial de Kurt Neumann. *Arbeitsmaterial Nr. 7*, Fachgruppe Interlinguistik/Esperantologie, Zentraler Arbeitskreis Esperanto im Kulturbund der DDR. Berlin.
- JOSSINET, Roland "Biografiaj informoj pri d-ro L.L. Zamenhof: lia vivo – liaj vojaĝoj". En *Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro*, red. Ivo Lapenna. Londono, p. 13-22.
- KÖKÉNY, Lajos / BLEIER, Vilmos (redaktoroj) *Enciklopedio de Esperanto*. 2 volumoj. Budapest.
- LAPENNA, Ivo / LINS, Ulrich / CARLEVARO, Tazio (redaktoroj) *Esperanto en perspektivo*. London, Rotterdam.
- MAIMON, N.Z. "Naĥum Slouŝĉ – la forgesita pioniro". *Esperanto*, vol. 70, n-ro 859-60 (7-8), p. 130-132.
- MAIMON, N.Z. *La kaŝita vivo de Zamenhof*. Tokio. 1978
- MINUTE on the Life and Services of Professor Leo Wiener 1940 *Harvard University Gazette*, March 9, 1940, p. 123.
- PETRULIS, J. "Unuaj esperantistoj en Litovio". *Horizonto de Soveta Litovio*, 2a kajero, p. 14
- PRIVAT, Edmond *Historio de la lingvo Esperanto: la Movado – 1927 do – 1900-1927*. Leipzig.
- PRIVAT, Edmond *Aventuroj de pioniro*. La Laguna. Hispanio. 1962
- PRIVAT, Edmond *Vivo de Zamenhof* (5a eldono). Rickmansworth, Anglio.
- WIENER, Leo "Stray leaves from my life". Manuskripto, 68p. 1910? (publikigita en *Boston Transcript*, printempo, 1910)
- WIENER, Norbert *Ex-prodigy: my childhood and youth*. 1964 Cambridge, Mass.
- ZAMENHOF, Felikso *Verkoj de FeZ*. Redaktita de Edvardo 1935 Wiesenfeld. Budapest.
- ZAMENHOF, Leono "El la biografio de d-ro L.L. Zamenhof". 1921 En *Dokumentoj de Esperanto*, redaktita de Albin Möbusz, Berlin, p. 15-21.
- ZAMENHOF, Ludoviko L. *Originala verkaro*. Redaktita de 1929 Johann Dietterle. Leipzig.
- ZAMENHOF, Ludoviko L. *Leteroj de L.L. Zamenhof*. Redaktita de Gaston Waringhien. 2 volumoj. Paris.
- ZIOŁKOWSKA, Maria *Doktoro Esperanto*. Tradukita de Isaj 1959 Dratwer. Warszawa.



Spite la altan prezon, preskaŭ du mil esperantistoj jam posedas ĉi tiun unikan verkon. Ne mirinde, ĉar la fakuloj epitetis ĝin jene: monumenta verkego (Waringhien), maksimuma kompleteco (Benczik), senprecedenca entrepreno (Régulo), giganta trezoro (Blanke), epopo (Pool), miraklo de precizeco (Boulton), grandioza (Kurusu), treege valora volumo (Jung), kvazaŭ streĉa romano (Wells). Estas tempo zorgi, ke oni troviĝu en la lasta milo de la posedantoj!

esperanto en perspektivo

Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.) kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA/CED, 1974. 876p. 20,5x14cm. 65 ilustraĵoj. 40 indeksopaĝoj. ISBN 92 9017 016 6. Prezo: 84,00 (por Nederlando 87,36) gld., plus sendokostoj 10%.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO de UEA!

INSTRUADO:

Duagrada kurso en Aix-en-Provence

JUS KREIGIS duagrada kurso de Esperanto en la Provenca Universitato (Aix-en-Provence, Francio). De post la komenciĝo de la Esperanto-instruado tie (1970), ekzistis nur unuagrada kurso. Ekde nun la instruado konsistos do el du studjaroj: la unua estos plu dediĉita al la bazaj scioj, la dua al pliperfektigo kaj enkonduko en la literaturon. Ĉiu kurso disponas pri unu horo kaj duono semajne. Ambaŭ kursojn gvidas Michel Duc Goninaz*, kiu nun dividas egale sian instru-tempon inter la rusa lingvo kaj Esperanto.

Tie do estas akirebla universitata diplomo pri Esperanto. La lingvo estas elektebla ankaŭ kiel ekzameno-parto por ŝtata diplomo. La kreo de la dua studjaro duobligas la gravecon de tiu diplomo. Ĝis nun la

* Tiu novgeneracia franca esperantologo, kiu de tempo al tempo kunlaboras ankaŭ en nia revuo, en septembro pasintjare prelegis pri "Slavaj elementoj en Esperanto" en internacia kongreso de slavistoj, okazinta en Jugoslavio.

kurson sekvadis ĉiujare inter 15 kaj 30 gestudentoj. En 1978, 12 kandidatoj sukcese trapasis la ekzamenon. La Esperanto-fako posedas bibliotekon kun ĉ. 560 volumoj kaj abonas 9 esperantlingvajn revuojn. La studentoj povas ankaŭ labori pri Esperanto en la lingvo-laboratorio. La adreso de la fako estas: Université de Provence, Section d'espéranto (ILGEOS), 29, avenue Robert-Schuman, F-13621 Aix-en-Provence, Francio.

Koresponde en Kanado

LA EDUKMINISTERIO de la kanada provinco Brita Kolumbio anoncas novaĵon en siaj Korespondaj Edukaj Kursoj. Temas pri la kurso "Esperanto por komencantoj", konsistanta el 18 lecionoj, 90-minuta sonkaseto, vortaro kaj ekzercoj. La tuta kurso kostas 15 kanadajn dolarojn por la loĝantoj de la provinco, kaj 20 dolarojn por aliaj kanadanoj. La prezoj ne inkluzivas la kostojn por la kaseto. 12-paĝa informilo pri la kurso impresas kiel resumo de kompetenta gvidilo tra la lingvoproblema labirinto, pri kio la kanadanoj, kun siaj propraj enlandaj lingvaj antagonismoj, certe havas la necesan komprenon.

BIBLIOGRAFIO:

Ni denove mankas en konsultolibroj

LA NUNTEMPA monda kulturo ĉiam pli dependas de la interŝanĝo kaj transdono de la informoj. La parto de la nacia ekonomia produktaĵo de la industriaj landoj, kiu konsistas el la informinterŝanĝo, kreskas de jaro al jaro. Gravaj konceptoj en la sfero de la informscienco estas la katalogado, indeksado, kompilado de bibliografiaĵoj, resumoj, serĉado de bibliografioj kaj resumoj.

Fronte al tio, kiel statas la Esperanta gazetaro, libraro, bibliotekoj, eldona agado entute? Se ekstera esploristo, fakulo el alia fako, politika decidofaranto, volus informiĝi pri nia temaro, ĉu li sukcesus per la nuntempaj serĉmetodoj?

Verŝajne ne. La sperto de esploristo estas, ke la verkoj, kiujn ni diskutas, laŭdas, recenzas, tamen ne aperas en la konataj, vaste uzataj nacilingvaj indeksoj, librokatalogoj kaj bibliografioj. El la vidpunkto de la informscienco, do, ili ne ekzistas, ĉar ili estas neretroveblaj. Nia elementa tasko devos esti, ŝanĝi tion.

En la lingvoscienco, lingvo-instruado kaj lingvistiko, ekzemple, ekzistas nur malmultaj internaciaj plenaj bibliografioj. Verkita en la angla, sed uzata kaj alte taksata ankaŭ en neanglalingvaj landoj, estas *MLA International Bibliography*, de la Modernlingva Asocio de Usono (Modern Language Association). La unua volumo konsistas el bibliografio de lastatempaj esploroj pri la anglalingva literaturo; la dua volumo, de la neangla beletro; la tria, de la lingvistiko. En tiu tria volumo staras preta ĉapitro, kiu bonvenigas niafakajn esplorojn: "Internaciaj lingvoj". Ekzemple, la bibliografio eldonita en septembro 1978 listigas verkojn de la jaro 1977, kaj eldonaĵojn de antaŭaj jaroj (ekde proks. 1970), hazarde ne notitajn en antaŭaj eldonoj de la bibliografio.

Ni rigardu la liston de la verkoj de la jaro 1977. Kiom da beletraj esploroj, recenzoj, lingvistikaj studoj, vortaroj, lernolibroj, dokumentoj en aŭ pri la Internacia lingvo aperis en 1977? La rubriko "Internaciaj lingvoj" en *MLA International Bibliography, Vol. III, Linguistics* entenas precize ses erojn (pri studoj aperintaj en la angla, franca kaj germana lingvoj) — nenian libron, nenian recenzon. Sed, ĉu vere nenio estis verkita en Esperanto dum la tuta jaro 1977? Ĉu nenio estis verkita pri interlingvistiko dum tiu jaro en la rusa, hungara, pola, nederlanda, itala, portugala?

Nu, sufiĉas. Ni ne estas diskriminaciataj. MLA bonvenigus la sendadon de niaj eldonaĵoj, por listigo en estontaj kajeroj de la bibliografio. Ankaŭ eblas sendi eldonaĵojn de antaŭaj jaroj. Prefere, sendu ekzempleron, aŭ fotokopion de la koncerna eldonaĵo. Se temas pri artikolo aŭ recenzo, nepre indiku plenajn bibliografiajn detalojn — eldonlokon, volumon kaj numeron, paĝnumerojn de la koncerna periodaĵo. Se ne eblas sendi ekzempleron de la libro, sendu plenajn bibliografiajn donitaĵojn. Oni sendu ĉion al: Research Data Bank, Modern Language Association, 62 Fifth Avenue, New York, NY 10011, Usono, kun indiko "por *MLA Bibliography*".

Richard E. Wood

Defende al Hendrik Adamson

En la n-ro 7/8 1978 de la revuo aperis artikolo de Reto Rossetti "Kalocsay, la kolosa diletanto", enhavanta alineon pri la estona Esperanto-poeto Hendrik Adamson (1891-1946): "...Kalocsay respondis, ke ankaŭ la fruajn versojn de Adamson li reverkis por *Dekdu poetoj* (1934), ĉar ili estis 'nekredeble primitivaj, sed li havis kelkajn bonajn ideojn'! Do jen el nepoeto li fabrikis poeton, kaj la brava estono iris kun falsita pasporto en la Esperantan panteonon" (p. 135).

Nin, estonajn esperantistojn, ege ĝenas la lasta frazo de R. Rossetti, ĉar ĝi sonas kiel mortoverdikto al la **poeto** H. Adamson, anoncita 30 jarojn post lia fizika morto. Kvankam — verŝajne — temas pri iuj hazardaj kaj nepripensitaj vortoj de K.K. (kio ne videbliĝas el la deklaro de R.R.), ni komparis la versaĵojn aperigitajn en *Dekdu poetoj* kun la manuskriptoj de H.A.,

troviĝantaj en la literatura muzeo en Tartu, kopiitaj far ni.

Kio evidentiĝas?

En *Dekdu poetoj* aperis 11 versaĵoj de H.A. Inter la manuskriptoj mankas el ili unu — "Nokta kanto". El la restintaj 10 troviĝas ŝanĝoj ("polurado" de K.K.) en 4 versaĵoj: "Diogeno", "Al profeto", "Rezigno" kaj "Vesperkanto". Iliajn apudmetitajn tekstojn ni aldonas.* Oni povas konvinkiĝi, ke la ŝanĝoj far K.K. ne rajtigas taksi ilin "nekredeble primitivaj". Ses versaĵoj ("Ŝi", "Amekstaz'", "Ni ĝoju!", "Pianludanto", "Gril'" kaj "Aŭtuntamburoj") restis tute neŝanĝitaj. Estu aldonite, ke ĝis 1934 aperis de H.A. jam kvar versaĵkolektoj en la estona lingvo, kio montras, ke H.A. ne estis komencanto en poezio.

Pri *Vesperkanto*:

En 1966 atingis K.K. (de J. Régulo-Pérez) 150 versaĵoj de H.A., retajpitaj el la manuskriptoj kaj diversaj E-gazetoj. K.K. elektis laŭ sia bontrovo kaj gusto kaj ne nur redaktis, sed ankaŭ "poluris" la elektitajn pecojn, parte dishakis kaj kunmetis novajn, parte reverkis. Li aldonis ankaŭ unu sian propran

Laŭ la manuskripto:

Laŭ "Dekdu poetoj":

DIOGENO

Moderna mi Diogeno, —
en **propra loĝas barelo**,
vi, homoj, flanken! **ne ĝenu**
varmigi ĉe l' suno orelon.

Forpaŝu, Makedoniano,
ne baru **al mi radiojn**,
superas en ili **sinbano**
la venkojn glorajn viajn.

Kaj nur la mian lanternon
mi kredas ja pli valora,
ĉar montras ĝi vian internon
kun via mizero plora.

Por kio viaj purpuroj
kaj multekostaj ŝtonoj, —
vi estis kaj estos stultuloj,
vi estis kaj estos friponoj.

Amasoj da homaj kranioj —
rikolto de **sangaj bataloj** —
jen spuroj de glormanio
por landoj kaj homoj fatala.

Sed mi ne bezonas gloron,
nek flatojn de vanta kortego,
en **kor' mi kunsentas** doloron
de kruda hommortigo.

Kaj mi ne bezonas oron,
nek ĉiujn trezorojn de l' mondo,
sed sangan mi ploras ploron
pri **hommajjustec'** kaj senhonto.

Moderna mi Diogeno, —
mi **propran loĝas barelon**,
vi, homoj, flanken! **sen ĝeno**
ĉe l' sun' mi varmigu orelon.

Forpaŝu, Makedoniano,
ne baru **sunbrilojn orajn**,
superas en ili **la bano**
triumfojn viajn glorajn.

Eĉ sole mian lanternon
mi kredas ja pli valora,
ĉar montras ĝi vian internon,
kun via mizero plora.

Por kio viaj purpuroj
kaj multekostaj ŝtonoj,
vi estis kaj estos stultuloj,
vi estis kaj estos friponoj.

Amasoj da homaj kranioj —
rikolto de **falĉo batala**,
jen spuroj de glormanio,
por landoj kaj homoj fatala.

Sed mi ne bezonas gloron,
nek flatojn de vanta kortego,
en **koro mi sentas** doloron
de kruda hommortigo.

Kaj mi ne bezonas oron,
nek ĉiujn trezorojn de l' mondo,
sed sangan mi ploras ploron
pri **homaj maljust'** kaj senhonto.



Hendrik Adamson (1891-1946)

eksperimentan versaĵon ("Rakonto de ventoj"). Tiel fariĝis *Vesperkanto*, enhavanta 80 erojn. Sendube la "poluritaj" versaĵoj gajnis versteknike, sed parte ankaŭ — pro tio, ke K.K. ne konis cirkonstancojn de la antaŭmilita Estonio — perdis sian originalan valoron kaj la nacian koloraron proprecan al la poezio de H.A. Krome, poemoj de H.A. estis verkitaj en la 40-jara Esperanto, *Vesperkanto* aperis en la 80-jara, do pli riĉa kaj

"polurita" Esperanto. Detala analizo ne estas celo de nia letero.

La celo de nia letero estas atentigi jenon:

La esperantlingva originala poezia kreaĵo de H.A., apartenanta al kulminoj de la antaŭmilita E-poezio, restas, kiel antaŭe, dissemiita sur paĝoj de diversaj E-revuoj, atingebla kaj konata nur al malmultaj esperantistoj de la lastaj du jardekoj. *Vesperkanto*, "polurita" kaj parte reverkita far K.K., prezentas nur proksimume duonon de la tuta poezia verkaĵo de H.A. en pli moderna, pli perfekta vesto. H.A. estis kaj restas estona kaj Esperanta poeto certe ankaŭ sen "polurado" kaj reverkado far K.K., kompreneble — poeto de sia epoko. Per tio ni ne volas subtaksi la talenton kaj rolon de K.K. en la Esperanto-literaturo.

La aserto, ke K.K. "el nepoeto fabrikis poeton" kaj irigis H.A. "kun falsita pasporto en la Esperantan panteonon" estas nepripensita arogantaĵo, ne depende

Laŭ la manuskripto:

Forpasis kure la juneco —
temp' tro revema sen prudent' —
kaj estingiĝis purpurmeĉo
en malproksima orient'.

Min tro lacigis voj' ŝtonoza,
sur dorso **de zorgegoj ĝib'** —
antaŭen iras senripoze
mi sub la sortobata vip'.

Atendas min jam sub plataĵo
de tombo ĝi, malvarma lit',
volviĝas sole el kreskaĵoj
de tero ĉirkaŭ kruco vit'.

Laŭ "Dekdu poetoj":

VESPERKANTO

Forpasis kure la juneco,
temp' tro revema sen prudent' —
kaj estingiĝis purpurmeĉo
en malproksima orient'.

Min tro lacigis voj' ŝtonoza,
sur dorso **sidas zorgo-ĝib'**,
mi iras, iras, senripoza
vagulo, sub sortbata vip'.

Min jam, post lastaj lacaj paŝoj,
atendas tombo: frosta lit',
kaj ĉirkaŭ kruco el kreskaĵoj
de l' ter' volviĝos sole vit'.

de tio, ĉu de K.K., ĉu de R.R., aŭ de ili ambaŭ.
Tallinn, la 19-an de sept. 1978.

Hilda Dresen, Jaan Ojalo, Henrik Seppik

* Pro spacomanko ni tamen aperigas nur du ekzemplojn de la komparaj tekstoj. La redaktoro

EN FEBRUARO, LA DEKAN FOJON:

Semajno de Internacia Amikeco



LA SEMAJNO de Internacia Amikeco okazos inter la 18a kaj la 24a de februaro 1979. Ĉi-foje tio estos aparte signifoplena, ĉar la Semajno fariĝis 10-jara.

La origina celo de la Semajno de Internacia Amikeco estis celebri homajn kontaktojn trans naciaj limoj per Esperanto kaj krei komunan tradicion, kiun povus partopreni ankaŭ neesperantistoj de ĉiuj landoj. La Semajno kreiĝis antaŭ dek jaroj en la espero helpi, ke oni ekster la Movado uzos ĝin por konsciigi pri la intimaj rilatoj de internaciaj lingvo kaj amikeco.

La unua jaro de la Semajno estis tute sukcesa. Aperis artikoloj en nacilingvaj gazetoj kaj radio-programoj. En diversaj landoj eldoniĝis apartaj afiŝoj kaj okazis ekspozicioj aŭ publikaj kunvenoj. Individuaj esperantistoj kaptis la okazon por saluti geamikojn per plurlingvaj kartoĵoj. En postaj jaroj montriĝis granda interesiĝo pri la semajno en pluraj usonaj urboj kaj ŝtatoj. Sed bedaŭrinde, en la lastaj jaroj apatio enrampis niajn vicojn. La plej aktiva cerebro de la Semajno verŝajne nun okazas en Belgio. Ĉiujare diversaj urboj en tiu lando festas

la Semajnon per aparta programo, (sub la aŭspicioj de la Ministerio de la Nederlanda Kulturo), kun oficialaj akceptoj kaj publikaj koncertoj.

Se via familio, klubo aŭ urbo bezonas sugestojn pri manieroj festi la 10an datrevenon de la Semajno de Internacia Amikeco, petu la tiuteman konsilaron de la CO de UEA.

Interesiĝos ricevi sciigon pri viaj planoj kaj iliaj rezultoj la Komisiito de UEA pri la Semajno de Internacia Amikeco, kaj ĝia iniciatinto, s-ro E. Carlén, Yxhult, S-69202 Kumla 2, Svedio. Ankaŭ la Internacia Gazetara Servo de UEA volas scii pri via agado, se eble **antaŭ** la evento, aŭ almenaŭ tuj poste.

Do, ĝuu la Semajnon, certigu ke la 10a datreveno estu memorinda, kaj ne forgesu informi nin pri via agado!

A.B.

Kalendaro aperos en marto

Laŭ nia tradiciiganta kutimo, en la marta aŭ aprila numero de la revuo aperos kalendaro de la plej gravaj movadaj okazantaĵoj, planitaj por 1979. Ni povas publikigi nur la bazajn informojn (nomo de la aranĝo, loko, lando, dato, informadreso) pri gravaj, precipe internaciaj okazantaĵoj. Se vi ankoraŭ ŝuldas al ni tiusenkan kompletigan informon, — bonvolu!

Negante ĉion ŝi volas „ponti”

Recenzas Péter Rados (Hungario):

Ĝis nun; **Poemoj originalaj**, de Daphne Lister. Manĉestro: Esperantaj Kajeroj, 1976. 63p. 15cm.

Esperanto, kiel lingvo tuthomara, kapablas liberigi la homon disde hazarde-deviga aparteno al iu nacia idio-mo, alivorte disde ”fremdiĝo” en la lingva – poten-ciale do senfine vasta – sfero. Eble tio motivas la fakton, ke la movado, ideologio kaj sekve literaturo Esperantaj ekde sia naskiĝo estas firme kuniĝintaj kun la sopiro pri la liberiĝo de la homo. Tiu ĉi sopiro alpre-nas diversajn – religiecajn, humanismajn, raciismajn, revoluciajn – formojn, sed ĉiukaze ĝi estas ligita al la ribelo kontraŭfremdiĝa, eĉ se la vorton ”fremdiĝo” la ribeluloj neniam aŭdis.

Foliumante la poemaron de D. Lister (kajereton en-poŝe porteban), legante kaj relegante ĝin, oni konstater-niĝas: la poetino estas tute konscia pri la fremdiĝinta esenco de la socio. Ŝi amare eksplodas:

*Mi ne kredas je l' Frateco Tuthomara,
Mi eĉ ne kredas je l' frateco de la fratoj. . .*

(Paŝoj)

Kie estas Zamenhof kaj Baghy kun la naivaj pensoj pri homaranismo? Sed legu:

*Kunhomoj, ĉu vi konstatas,
Ke mi kompatas –
Silente vokas?
Ĉu vi reciprokas?*

(Malgraŭ Sartre)

La solvo de la kontraŭdiro inter la du citaĵoj estas, ke la poetino firme neas ĉiun konvencian sintenon, antaŭ-juĝon en ĉiu kampo de la vivo, ŝi volas doni proprajn respondojn al la demandoj de la socio. Ŝi ne rezignas pri la situacio, kiam

*El ŝajnoj ni konstruas,
Mondon prilaboras,
Kaj se la vero ne kongruas
Ĝin ignoras.*

(La dua ordono)

Ŝi scias: ekzistas vera vero, kaj ĝin ŝi strebas ekvidi sub la ŝajnoj. Tial Daphne Lister ne timas ataki eĉ la ŝajne plej sanktajn konceptojn. Ekzemple:

*Ĉiam ekzistos ”ili kaj ni”, sed la
perfiduloj pontas,*

Ili ne prihontas

Judasán rubrikon.

La perfiduloj amas la malamikon.

(Benataj estas la perfiduloj)

Kontraŭstarigante la koncepton ”fidelo” al la koncepto ”amo al malamikoj”, la poetino pruvas la malplen-econ de ili ambaŭ.

Ribelema sinteno de la verkistino, ŝia senindulga, akra rigardo al ĉiu socia fenomeno, inkluzive la Esperanto-movadon, faras ŝin originala reprezentanto de la moderna internacilingva literaturo. Daphne Lister, negante ĉion, konservas tamen la plej gravan tradicion de la Esperanta literaturo: ŝi volas ”ponti”, kiel ŝiaj ŝatataj perfiduloj. Tial ŝia ribelo estas esence humana (oni ne timu la vorton), Esperanta – en ambaŭ sencoj.

Mendu ĉe UEA: 3,90 (por Nederlando 4,06) gld., plus sendokostoj 10%.

Analiza laboro

Recenzas Vilmos Benczik (Hungario):

La socia romano en Esperanto de Henri Vatré (1908-). La Sagne: Kultura Centro Esperantista, 1973. 17p. Mimeo. 21 cm. Studoj 2.

La kajero enhavas prelegon de antaŭ ses jaroj, dum la 28a Kongreso de SAT-Amikaro.

Vatré plenumis pioniran laboron, ĉar la literaturscien-ca ekzamenado de niaj romanoj estas ĝis nun tre mal-ofta fenomeno. Li limigas sian taskon al la studado de tri verkoj (*Turstrato 4* de H. Weinhengst, *Metropolite-no* de V. Varankin kaj *Vojaĝo al Kazohinio* de S. Szat-hmári), sed ankaŭ liaj ĝeneralaj konstatoj estas intere-saj. (Ekz. li atentigas, ke dum la periodo 1918-1938 aperis pli da originalaj romanoj, ol dum la tuta cetera tempo de la historio de Esperanto. Tamen, estus bone, se li dirus, laŭ kiuj kriterioj li taksas iun proza-ĵon romano.)

Pri la tipeco de la tri pritraktitaj verkoj mi diskutus kun li, sed neniel pri liaj prijuĝoj: Vatré estas ĝisfunda konanto de nia literaturo, kaj certe ĉiuj legantoj de tiu ĉi broŝuro signife riĉigos siajn konojn pri la Esperanta romano.

Mendu ĉe UEA: 4,20 (por Nederlando 4,37) gld., plus sendokostoj 10%.

Amo, la sola eblo

Recenzas Rikardo Ŝulco* (FR Germanio):

La libro de la amo de Raoul Follereau (1903-). El la franca tradukis Lina Gabrielli. Ascoli Piceno: Eldono Gabrielli, 1977. Plejado 5. 61p. Ilus. 20cm.

Post la unuaj meritplenaj kvar kajeroj de la beletra eldonserio Plejado aperis nun tiu maldika, sed pro sia enhavo tre grava kaj pripensiga libro. Ĝi estas plenigita

* La recenzanto insistas pri ĉi tiu formo de sia nomo.

Mendu ĉe UEA: 13,50 (por Nederlando 14,04) gld.,
plus sendokostoj 10%.

Nova tradukvenko de Hilda Dresen

Tiel diligentan kaj sukcesan diskoniganton kaj porparolanton de la propralanda literaturo, kiel estas la estonino Hilda Dresen, malfacilas trovi. Ekde 1922 ŝi, pere de sentema Esperanta stilo, proponis al internacia

(Juhan Sütiste).

Mendu ĉe UEA: 7,50 (por Nederlando 7,80) gld., plus sendokostoj 10%.

La gaŭĉa bardo

Gravajn beletrajn verkojn ofte inspiras profundaj ŝanĝoj en socio, ĉar kontraŭaj sentimentoj, riĉaj je arta sugesteco, facile naskiĝas en tia etoso. Tiu fenomeno montriĝas en la gaŭĉeska literaturo, kies plej fama ero, *Martín Fierro*, estas havebla en Esperanto de antaŭ iom da jaroj. Ankaŭ *Santos Vega* apartenas al tiu ĝenro. Postveninte *Martín Fierro*-n, ĝia kreado ŝajnas esti postulinta pli da lingva normigo kaj samtempe pli da estetika stiligo ol la pli frua verko. Ne troviĝas en ĝi nekomunaj vortoformoj aŭ imitado de dialekta prononco. Prave rimarkas la antaŭparolanto, ke “la dua grava poemo” de la gaŭĉeska literaturo estas “verkita en klera lingvo”.



Tre interese estas sekvi la evoluon de tiu ĝenerale
altnivela poezio dum la tridekjara sortriĉa periodo en
la historio de Estonio. La jarojn dum kaj tuj post la

Vere, la belaj *décimas* de Obligado, klera versformo el-laborita je la fino de la deksesa jarcento, revivigita de la hispana romantikisto José Zorrilla, kaj majstre adaptita fare de la tradukinto, povas akcepti nur norman lingvon, se ĝi ne aperu groteska.

Santos Vega, verkita en 1887 kaj bazita sur la historio de folkloro heroo, traktas plejparte la temon de funda ŝanĝo de vivmaniero. La trobadoro Santos Vega, kies kantoj simbolas la gaŭĉan vivon, venkas en kant-konkurso Jan Sen Vestoj, simbolo de progreso, scienco kaj agrikulturo. La gaŭĉa bardo, male, ekonomie reprezentas la malnovan stadion de brutbredado. La gaŭĉaj vestoj estis pitoreskaj kaj tre ornamitaj; pro tio la vestoj de la senkolora moderna homo ŝajnas neekzistantaj. Oni rimarku, ke enmigra ondo al Argentino akcelis la ŝanĝojn. En la originalo troviĝas signifoplenaj vortoj ne aperantaj en la traduko: "en la ampleksan regionon elverŝis sin Eŭropo." Tamen, vortoj de oldulo ĉe la fino faras nin teologie pripensi la aferon. La maljuna gaŭĉo diras, ke venkis diablo Vega-n. Ĉu progreso kaj scienco tial estas diablo?

La traduko de Horacio Ré estas bonega, kvankam en kelkaj strofoj ĝi fariĝas tre libera, kaj en aliaj, iuj vortoj konsiderinde malsamas sence tiujn de la originalo. La rimo estas taŭga; oni trovas adasismon per **-iĝas**, sed tio ne gravas. En la paĝo 30 ("Ili perforte la bulon al ili prenas"), **al** estas hispanismo.

Mendu ĉe UEA: 3,60 (por Nederlando 3,74) gld., plus sendokostoj 10%.

Bonintenca laboro, trista rezulto

Recenzas Boris Kolker (Soveta Unio):

Optimala ortografio de la internacia lingvo Esperanto, Albert Lienhardt. Mulhouse: O.E.O., 1978. 122p. 21cm.

Sur mia librobreto staras lukse eldonita projekto de la internacia lingvo Neo. Evidente, la aŭtoro Arturo Alfandari elspezis por ĝi multege da mono, kaj precipe da laboro: imagu la ellaboritajn vortarojn francan-neo kaj neo-francan, ĉiu po 70 000 vortoj! Li penis fondi ankaŭ neo-movadon. Ne, li ne estis principa kontraŭesperantisto. Li supozis, ke la disvastigon de Esperanto bremsas ĝiaj internaj "difektoj". Tial li kreis surbaze de Esperanto sian monstrekan projekton. Post la forpaso de la aŭtoro, ankaŭ lia projekto sekvis lin en la transan mondon. Trista, kvankam instrua historio!

Similaj sentoj regis min post trastudo de la recenzata libro. Estas ekster dubo, ke Lienhardt agis bonintence. Ankaŭ li supozas, ke la disvastigon de Esperanto malhelpas ĝiaj supersignoj. Kaj li zorge ellaboris projekton de reformo, preterpase ŝanĝante la formon de ĉ. kvar mil radikoj kaj, same preterpase, ŝanĝante la nomon Esperanto al "UNAL". Li ne indulgis eĉ multegon da radikoj supersignaj. Li metis punkton, eldonis la libron kaj antaŭĝue atendas, ke la esperantistoj fariĝu

UNAL-istoj, ke ĉiuj registaroj tuj akceptu UNALon pro ĝia latineca aspekto (ne temas nur pri la forigo de la supersignoj sed ankaŭ pri enkonduko de q, w, x, y kaj similaj ĉarmaĵoj). Ankoraŭ unu trista historio. Kiom da instruoj necesas por kompreni la gravecon de eksterlingvaj faktoroj?

Prezo: 9,00 (por Nederlando 9,36) gld., plus sendokostoj 10%.



Curso relámpago de Esperanto, Ergoto de Bonaero (ps.). Buenos Aires: Instituto Argentino de Esperanto, 1978. 36p. Ilus. de H. Ré. 22cm. Dekleciono "fulmo-kurso". Kvarpaĝa aldonajo donas E-ajn tradukojn de hispanaj tekstoj. **Prezo:** 5,70 gld.

Ĉu vi konas Bulgarion? Roman Dekov kaj Genadi Georgiev. El la bulgara trad. Ivan Keremedĉiev-Esperov. Sofia-Preso, 1978. 48p. Ilus. 19cm. **Prezo:** 2,40 gld.

Harmonio en la kontraŭdiroj, La: Eta sarlanda dialektologio (1977), Ludwig Harig (1927-). El la germana trad. Reinhard Haupenthal. Saarbrücken: Sarlanda Esperanto-Ligo, 1978. 43p. 19cm. Paralelaj (germana kaj Esperanta) tekstoj. El la libro *La sarlanda ĝojo*. **Prezo:** 7,20 gld.

Kato en la sako, La. Red. V. Benczik. Budapest: Tankönyvkiadó, 1978. 133p. 15cm. ISBN 963 17 3305 X. Dek ok noveloj kaj poemoj de diversaj Esperantaj aŭtoroj. Kun notoj pri la aŭtoroj kaj E-hungara glosaro. **Prezo:** 2,40 gld.

Koncize pri MEM 1953/1978, W. Gilbert, N. Aleksiev, O. Kníchal, S.N. Podkaminer. Praha: MEM, 1978. 24p. Ilus. 21cm. **Prezo:** 1,20 gld.

Lertaj manoj bulgaraj (Srâĉni râce bâlgarski), A. Arnaudov. Sofia: DI "Septemvri", 1976. Kvinlingva (bulgara, rusa, franca, germana, Esperanta). Dek kvin duflankaj kolorfotaj kartoj, kiuj montras objektojn kaj ekspoziciojn en la distrikta etnografia muzeo de Pazarĝik. **Prezo:** 4,50 gld.

Mi afrikanigis, Hendrik W. van der Merwe. El la angla trad. Kris Long. Gloucester: Kvakera Esperantista Societo, 1978. 9p. 15cm. Lampiro 2. Pri la rolo de afrikansa kvakero en Sud-Afriko. **Prezo:** 1,20 gld.

Parlamentisma iluzio, La, C.A. Laisant. El la franca tradukis F.B.G. Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1979 (fakte 1978). 15p. Mimeo. 15cm. LJP 128B. Unue aperis antaŭ la unua mondmilito. **Prezo:** 0,30 gld.

Paroloj al miaj gefiloj (1968?), Walter Francini (1926-). Rio de Janeiro: Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, 1978. 81p. 18cm. Dulingva (Esperanta/portugala). Aforismoj spiritismaj. **Prezo:** 6,00 gld.

Senpera verbigo de adjektivoj, La (1955), H.A. de Hoog (1910-). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1978 (fotorepreso). 31p. 16cm. Klasika gramatika studo. **Prezo:** 5,40 gld.

Skota antologio. Glasgow: Kardo, 1978. 13+255p. Ilus. de Ruth Goodheir. 21cm. ISBN 0 905149 08 4. Kvindek aŭtoroj, ekde la 16a jarcento ĝis hodiaŭ. Antaŭparolo de W. Auld. **Prezo:** 15,00 gld.

Veraj interparoladoj de Sokrato, La, Han Riner (pseŭd. de Henri Ner, 1861-1938). El la franca trad. E. Lanti. Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1979 (fakte 1978). 146p. Mimeo. 21cm. La aŭtoro, en la persono de "Antisteno la bastardo", prezentas la "aŭtentikajn" pensojn de Sokrato, kiujn laŭ li misprezentis Platono. **Prezo:** 6,00 gld.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas la minimuman mendosumon de 15,— guldanoj. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas minimume 3,— gld.

Ĉi tiun rubrikon redaktas: IAN JACKSON, 6A Eastcombe Road, WESTON-SUPER-MARE, Avon, BS23 2TQ, Britio.

35a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO de TEJO, Austerlitz, Nederlando

1979 07 20 — 07 27

Adreso: 35a IJK, Postbus 4083, 9071 EB Groningen, Nederlando.

Kongreso okazos en arbaro

LA 35a IJK okazos en gastejo de la nederlandaj natur-amikoj, konsistanta el kvar konstruaĵoj, kie la partoprenantoj povos kaj loĝi kaj kunveni. La konstruaĵoj estas lokitaj unu apud la alia, en bela arbaro (v. la foton).



La vilaĝo Austerlitz estas facile atingebla piede de la kongresejo, kaj de tie estas bonaj publiktransportaj ligoj.

Programo. Tage okazos laborgrupoj, prelegoj kaj paroliga kurso; kunvenos ankaŭ muzik- kaj danc-grupoj. Vespere estos distraj aranĝoj, kiel internacia diskoteko dum la konatiĝvespero, kaj nederlanda, internacia, literatura kaj filma vesperoj. La pariza Esperanta teatra grupo TESPA prezentigos en subĉiela teatro, lokita en la ĝardeno de kastelo el la 17a jarcento, en la urbo Zeist. Tuta tago dediĉigos al ekskurso tra la meza kaj okcidenta partoj de Nederlando, kie videblos polderoj (landpartoj, kie iam troviĝis maro) kaj marparto, kiu post kelkaj jaroj transformiĝos en sekan grundon.

La ĉeftemo de la kongreso estos "Interŝtataj unuiĝoj — kiucele?", temo nuntempe tre aktuala kaj vigle debata. Serioze traktos la temon seminario de KER, la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO, kiun partoprenos ankaŭ pluraj neesperantistoj. La celo estos kompreni la hodiaŭan tendencon al internacia kunlaboro kaj unuiĝo, kaj ties sociajn efikojn. Kongresanoj

ricevos (kun la kongresa konfirmilo) inviton partopreni la seminarion, al kiu do necesas aliĝi. Tamen la prelegoj kaj iuj aliaj partoj de la seminario estos malfermaj al ĉiuj.

Kongreslando. La plimulto de homoj, pensante pri Nederlando, enpense kreas bildon de ventmueliloj kaj digoj, kiuj preventas inundigon de la aparte plata kaj malalta lando. Tiaj bildoj estas ankoraŭ parte aktualaj, kaj la partoprenantoj de la tuttaga ekskurso certe vidos multajn muelilojn kaj digojn. Ankoraŭ ekzistas multaj ĉarmaj vilaĝoj, kies domoj impresas eksterlandanojn kiel nekutime orde aranĝitaj kaj puraj. La kongresvilaĝo mem situas en aparte arboplena regiono, kun pluraj belaj eblecoj por promeni kaj bicikle ekskursi.

Necesas memori, tamen, ke la vivo en Nederlando ne plu konsistas nur el mueliloj kaj digoj. La nederlanda ekonomio estas inter la plej fortaj en Eŭropo, kaj la komunumo Zeist, kie troviĝas la vilaĝo Austerlitz, situas sur la rando de la plej evoluinta industria regiono de la lando kaj samtempe la plej dense loĝata angulo de la terglobo. Tiu vigleco kaj homabundo postulas apartan atenton al sociaj demandoj. La politika sistemo kaj multaj el la sociaj institucioj en Nederlando estas aparte malfermaj al la diversaj gradoj kaj tendencoj de opinio en la socio. Vizitantoj al la lando povas trovi unikaĵojn, tiel en la fizika, kiel ankaŭ en la socia pejzaĝo.

Aliĝo. Preparlaboroj por la kongreso komenciĝis antaŭ pluraj monatoj, kaj jam atingis sufiĉe progresintan stadion. Aliĝiloj kaj la dua informilo estas haveblaj ĉe la kongresadreso (vidu supre), aŭ ĉe la Centra Oficejo de UEA. La tria informilo estos sendita al ĉiuj aliĝintoj en junio. La kotizoj en nederlandaj guldenoj estas jenaj:

Aĝo de la kongresano	Antaŭ 1979 04 30	Antaŭ 1979 06 30
ĝis 20 jaroj	185 gld.	205 gld.
21 — 25 jaroj	205 gld.	225 gld.
26 — 32 jaroj	225 gld.	245 gld.
pli ol 33 jaroj	250 gld.	270 gld.

Individuaj membroj de TEJO (tio estas membroj de UEA malpli ol 26-jaraj, kiuj ricevas minimume la Jarlibron) ĝuas rabaton de 10 gld.

La kotizo inkluzivas loĝadon, manĝojn kaj ekskurson. La kotizon oni prefere ĝiru al nederlanda poŝta ĝir-konto n-ro 40 07 032 ĉe la kongresa adreso, kien oni sendu ankaŭ la aliĝilon. Nur se ne eblas pagi al la indikita poŝta ĝirkonto, oni konsultu la landan sektion de TEJO aŭ la landan peranton de UEA pri pagmaniero. Ĉiu kongresano ricevos konfirmilon tuj post la enregistaro de la pagita kotizo. Kaj bone notu, ke disponeblas nur 350 lokoj!

Anna Brennan



Kongresa Komunikilo

**64-a UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO, Lucerno (Svislando)
1979 07 28 – 08 04**

**Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando.**

**Adreso de LKK: Esperanto, Poŝtfako 14,
CH-6512 Giubiasco, Svislando.**

Impona Honora Komitato. La Honoran Komitaton de la 64a UK prezidas d-ro Hans-Rudolf Meyer, parlamentano kaj nuna urbestro de Lucerno. Aliaj membroj estas s-ro Luigi Generali, prezidanto de la Nacia Konsilantaro (parlamento), s-ino Josi J. Meier, nacia parlamentano kaj membro de Eŭropa Parlamento, d-rino Emilie Lieberherr, senatano, d-ro Walter Gut, registara konsilisto kaj kantona edukdirektoro de Lucerno, s-ro Gilbert Duboule, parlamentano kaj prezidanto de Europa Union, s-ro Felix Schnyder, ambasadoro kaj prezidanto de la nacia Unesko-komisiono, s-ro Anton Haengi, episkopo de Bazelo, d-ro Werner Kämpfen, direktoro de la Svisa Nacia Turisma Oficejo, ing. W. Grob, rektoro de la Federacia Teknika Altlernejo, kaj s-ino Helga Kohler, prezidanto de la Virina Komisiono de la Svisa Sindikata Unuiĝo kaj vicprezidanto de tiu Unuiĝo. Kiel jam anoncote, Alta Protektanto estas d-ro Hans Hürlimann, kiu en 1979 estos federacia prezidanto de Svislando.

Tutlanda LKK. Kiel pasintjare, la Loka Kongresa Komitato estas ne tute loka. La dek membroj kaj du revizoroj troviĝas dise tra Svislando, kvankam kon-

centrite en la nordo. Prezidanto estas s-ro Kurt Greutert, vicprezidanto s-ro Ernst Glättli, kaj kasisto f-ino Lilly Schaerer. D-ro Arthur Baur akceptis gvidi la Kongresan Gazetaran Servon, kiel li faris ankaŭ ĉe la 32a UK (Berno, 1947). La plej multaj membroj de LKK intencas veni unu semajnon antaŭ la UK al Lucerno, por ke ĉio glate funkciu jam kiam alvenos la unua kongresano.

Kunsidoj antaŭmendendaj! Mendoj por kunsidoj dum la 64a UK nepre alvenu al la konstanta adreso ĝis la 1a de marto 1979. Organizaĵoj, kiuj volas mendi kunsidon kaj ne ricevis mendilon, tuj petu tion ĉe la konstanta adreso.

Denove Esperantologia Konferenco. Pro la granda populareco de la Esperantologia Konferenco dum la 63a UK en Varno, la Konferenco havos sian duan sesion en Lucerno. Interesitaj esperantologoj sendu prelegproponon (kun titolo, kelklinia resumo kaj koncizaj indikoj pri la faka kompetenteco de la proponanto) al la organizanto: d-ro Detlev Blanke, CLE Esperanto, Charlottenstr. 60, DDR-108 Berlin, Germana DR, ĝis la 1a de februaro 1979.

Porinfana literaturo ĉe Belartaj Konkursoj. Okaze de la Internacia Jaro de la Infano, Belartaj Konkursoj dediĉos apartan branĉon al la literaturo porinfana. Povas temi pri diversspecaj literaturaĵoj (fabelo, novelo, poemo, kanto, drameto), laŭ la teknikaj normoj de la responda "plenaĝula" branĉo de BK. Oni sendu ĉiujn konkursaĵojn en kvar ekzempleroj al la sekretario de BK: s-ro Alec Venture, 7 Grosvenor Road, Wallington, Surrey SM6 0EG, Britio. Ĉiuj verkoj devos lin atingi ĝis la 31a de marto 1979.



Arta kaj Kongresa Domo de Lucerno fine de julio kaj komence de aŭgusto ĉi-jare gastigos la 64an UK de Esperanto.

Artaj aranĝoj en preparo. LKK jam cirkuleras al artistoj pri prezentoj en la Internacia Arta Vespero en Lucerno, sed povus esti, ke kelkajn talentulojn ĝi pro iu aŭ alia kaŭzo malsukcesis trafi. Sinproponoj (kun detaloj pri la eventualaj prezentaĵoj kaj kun financaj kondiĉoj de la artisto) iru al la LKK-ano respondeca pri IAV: s-ro Momĉilo-Moŝo Pavlović, Rosentalstr. 70, CH-8400 Winterthur, Svislando.

Varbado per UK. Inter la taskoj de LKK (kaj aliaj kongreslandaj esperantistoj) estas ne nur varbi por la UK, sed ankaŭ ĝin utiligi varbante sialandanojn al la Lingvo Internacia. Ke la svisaj esperantistoj scias kapti la okazon, montras bele ilustrita artikolo en la semajna aldonajo al la ĵurnalo *Luzerner Neuste Nachrichten* (1978 10 14-20). La artikolo mencias la eminentajn svisajn esperantistojn Hector Hodler kaj Edmond Privat, kaj la agadon de Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds. Duonpaĝo dediĉiĝas al "Kleiner Sprachkurs" (lingvokurso). Speciala formo de varbado estos rapidkurso de Esperanto, kiun LKK ofertas al la personaroj de lucernaj hoteloj antaŭ la UK.

Kvindek lokoj en Infankongreseto. Pro la kvanto de disponeblaj dormlokoj, la 17a Internacia Infana Kongreseto akceptos nur kvindek partoprenantojn. La kotizo, kiu inkluzivas loĝadon, manĝojn kaj la programon (kun ekskursoj al la Transportmuzeo de Lucerno kaj, boate, sur la Kvarkantona Lago) estas 180 sFr. (160 sFr. por gefratoj kaj lerneaj grupanoj). Pliaj informoj eliros kun la Dua Bulteno. Aliĝiloj estos haveblaj antaŭ la jarfino ĉe landaj perantoj, la konstanta adreso kaj LKK. Internacia teamo de prizorgantoj jam varbiĝas. Se vin interesas helpi en la Kongreseto, skribu al LKK kun indiko pri viaj kvalifikoj.

Fariĝu la kvina diplomito! De post sia fondiĝo en 1961, la Internacia Ekzameno de UEA havis entute kvar diplomitojn. Evidente temas pri tre elita grupo: la Akademio de Esperanto ja havas pli ol dekoble tiom da membroj (inter kiuj du el la diplomitoj). Se vi ambicias akiri la plej severan ateston pri la kapablo instrui Esperanton je supera nivelo, ekstudu nun! Detala regularo kaj listo de rekomendita literaturo estas haveblaj kontraŭ internacia respondkuponon ĉe la sekretario de la Internacia Ekzamena Komisiono, mag. William Auld, 20 Harviestoun Road, Dollar, Clack., FK 14 7HG, Britio, aŭ ĉe la CO de UEA. La broŝuro *Internacia ekzameno: Specimenaj demandoj* estas havebla ĉe la Libroservo de UEA kontraŭ 3,00 gld. aŭ 4 internaciaj respondkuponoj (1,80 gld. en la kadro de libromendo).

Ne nur UK. Krom la Universala Kongreso, lokon havos en Svislando pluraj aliaj atentindaj Esperanto-eventoj. La 13a Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj lokiĝos en Lokarno, 1979 07 19-28. En Bienenberg (apud Liestal) okazos la 31a Kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia, 1979 08 04-11. Pri la 47a Internacia Kongreso de



Lucerno estas la ĉefurbo de la svisa turismo. Tamen, ĝi estas rimarkinde intima urbo, kion sendube spertos ankaŭ la partoprenantoj de la 64a Universala Kongreso ĉi-jare.

Blindaj Esperantistoj ankoraŭ mankas definitivaj informoj, sed ĝi verŝajne okazos en Svislando antaŭ kaj eble parte koincide kun la 64a UK. Ankaŭ Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds planas specialan programon de sia Internacia Fiera Altlernejo ĉirkaŭ la 64a UK. Kaj oni nepre ne forgesu la Oficialan Postkongreson en Interlaken (1979 08 05-11).

Pli ol tricent. Malgraŭ la malfrua apero de la aliĝilo en aŭgusto, aliĝis jam (ĝis 1978 11 30) 362 kongresanoj, plej multnombre el Svislando (58), FR Germanio (46), Francio (44) kaj Nederlando (41).

Nova statuto de UEA, kiam?

Tio dependas ankaŭ de vi! La Komitato jam en Lucerno intencas diskuti kiel eble plej definitivon statutproponon. Tiun definitivon povus, rajtas (kaj devus) partopreni la tuta membraro de UEA. Tiurilate rerigardu nian decembran numeron, kiu enhavas kunlaborinviton pri la statutaj demandoj, direktitan ankaŭ al vi mem.

Britio

• Kiam Esperanto ricevas kelkminutan atenton en preskaŭ ĉiuj elsendoj de la Brita Radio (BBC), devas temi pri grava novaĵo. Tamen, ĉi-foje la novaĵo estis erara! La 8an de decembro 1978, la Brita Radio atentigis sian mondvastan aŭskultantaron pri "centjara" datreveno de la Internacia Lingvo, ligante tiun jubileon al la 17a de decembro 1878, kiam la juna Zamenhof konatigis sian "Lingwe Uniwersala" al la familianoj kaj gimnaziaj kolegoj. Tiun centjarigon de pra-Esperanto ankaŭ ni omaĝas per ampleksa kontribuaĵo sur la paĝoj 4 ĝis 6 de ĉi tiu revunumero. Nominon centjara jubileo de Esperanto mem estas eraro, kiu ne kontribuas al la renomo, tiel de la Brita Radio, kiel de Brita Esperanto-Asocio, kiu dissendis tiuokazan novaĵbultenon kaj kies prezidanto intervjuiĝis en la elsendo.

Germana DR

• Fariĝas jam tradicia la Internacia Foir Esperantista Renkontiĝo en la kadro de la fama Foiro de Leipzig. Ĉi-jare ĝi okazos inter la 9a kaj la 11a de marto 1979 kaj enhavos riĉan turisman kaj klerigan programon. Pri aliĝo kaj aliaj detaloj skribu al: IFER '79, Käthe-Kollwitz-Str. 115, DDR-701 Leipzig, Germana DR.

Ĉilio

• Per ferma solenaĵo, la 15an de decembro finiĝis Esperanto-kurso en la Pedagogia Instituto de la Ĉilia Universitato en Santiago. Ĝenerale, la Movado ree ekviglas en tiu lando, kie lastatempe ekaperis ankaŭ Esperanta bulteno *La verda sago*. Bonvenus helpo per instrumaterialoj kaj aliaj esperantaĵoj, sendeblaj al la UEA-delegito: s-ro Iván Mättig C., Casilla 13828, Santiago, Ĉilio.

FR Germanio

• Inter la 3a kaj 5a de novembro, Germana Esperanto-Asocio okazigis iom novstilan renkontiĝon, kiun partoprenis 15 aktivuloj en la landa asocio. En formalaj (kunvenis ankaŭ la estraro de GEA) kaj neformalaj kunsidoj, dum 18 horoj entute, oni tuŝis multajn movadajn demandojn,

teoriajn kaj praktikajn. Pro la sukceso de tiu unua diskuta semajnfino, oni planas similajn aranĝojn ankaŭ estonte, sed pri unu anticipe difinita temo. La unua el ili okazos inter la 19a kaj 21a de januaro 1979 kaj dediĉigos al la informa laboro.

• En Schwelm, 50km nordoriente de Kolonjo, la 28an de oktobro okazis solena inaŭguro de "Esperantoweg" (Esperanto-vojo). La solenaĵon partoprenis i.a. la urbestro, s-ro Rainer Döring, kaj ĉ. 200 gastoj, el



kiuj plurdeko venis de eksterlando. Ĉeestis ankaŭ s-ino E. Bormann, prezidanto de Germana Esperanto-Asocio. Estas interese, ke la nova Esperanto-strato kuniĝas kun la jam pli frue inaŭgurita "Zamenhofweg" (vidu la foton).

Svislando

• Grandaj movadaj eventoj okazos en Svislando ĉi-jare. Ne temas nur pri la 64a Universala Kongreso en Lucerno sed ankaŭ pri la ekspozicio, kiun anoncas la suba afiŝo, plurlingva kiel la lando en kiu ĝi okazos. Dum la 64a UK estas ĉefe zorgo de la aktivuloj arigitaj ĉirkaŭ Svisa Esperanto-Societo, landa asocio de UEA, la granda ekspozicio estas rezulto de kelkara zorga laboro de Kultura Centro Esperantista, alia grava movada instanco en Svislando. Post Berno, la ekspozicio migros al aliaj svisaj urboj kaj venos al Lucerno dum la 64a UK tie.



Berno Nacia Biblioteko
Bern Landesbibliothek
Berne Bibliothèque nationale
Berna Biblioteca Nazionale

de la 11a de januaro ĝis Pasko 1979
vom 11. Januar bis Ostern 1979
du 11 janvier à Pâques 1979
dall'11 gennaio fino a Pasqua 1979

Ĉinio

• Plioftiĝas movadaj kontaktoj kun Ĉinio (v. ankaŭ la paĝon 4). La plej freŝa el ili estas tiu farita de s-ino Yukiko Isobe, komitatano de UEA kaj unu el la direktoroj de Japana Esperanto-Instituto. Ŝi faris dusemajnan viziton al Ĉinio fine de novembro kaj en sia programo rezervis kvar tagojn por kontaktoj kun la Esperantaj instancoj en la ĉina ĉefurbo. En sia raporto pri la pekina vizito s-ino Isobe entuziasme emfazas, ke la programo inkluzivis ankaŭ privatan gastigon ĉe s-ino Ĝang Ĝongliu, ĉefredaktorino de *El popola Ĉinio*. Dum la restado en Pekino, s-ino Isobe i.a. intervjuiĝis por la Esperanta programo de Radio Pekino.

Francio

• En la fama libroserio "Fleuve Noir" ĵus aperis la romano *Le Général et l'Antibabel* de Pierre Nemours. Kurioze, la libro kemenciĝas per esperantlingva dediĉo al s-ro André Bourdeaux, fervojista ĵurnalisto kaj esperantisto. Eĉ pli kurioze estas, ke la ĉefa scenejo de la romano nestiĝis en Varno, Bulgario — divenu kiam? — dum la pasintjara Universala Kongreso de Esperanto tie. La romano plurpaĝe (bone!) prezentas la bazajn informojn pri la lingvo, dum ĝia bildado de la Movado estas tro fantazia kaj politike tendenca.

Eksteraj rilatoj

- Inter la 13a kaj 16a de marto ĉi-jare, en la sidejo de Unesko en Parizo okazos simpozio pri la rajto je komunikado. La simpozion organizas la ne-registaraj organizaĵoj, kiuj havas oficialajn rilatojn kun Unesko. Ne nur, ke UEA partoprenos la simpozion, sed oni konfidis al ĝi la gvidadon de unu el kvar preparaj laborgrupoj, tiu pri "Lingvo kaj Komunikado". Cetere, ankaŭ la tuta ideo pri la okazigo de ĉi tiu simpozio venis de UEA, kiu proponis tiucelan rezolucion al la 16a konferenco de internaciaj ne-registaraj organizaĵoj, en novembro 1977 (vidu pri tio nian numeron de februaro 1978, p.37). La preparan laborgrupon nome de UEA gvidas s-ro E. Chicot, nia konstanta reprezentanto ĉe Unesko. La simpozion tre verŝajne partoprenos nome de UEA ankaŭ d-ro V. Sadler.

Kooperativoj

- Sen sufiĉa emfazo en la Esperanta gazetaro pasis grava evento en julio pasintjare: kooperativaj entreprenoj de la urboj Várpalota en Hungario kaj Kubrat en Bulgario subskribis dokumenton pri komerca kunlaboro, redaktitan en la Internacia Lingvo. Ankaŭ la intertraktadoj kaj solenaĵoj, kiuj kondukis al la subskribo de la dokumento, okazis en Esperanto. Krome, kreiĝis kunordiga komitato de Hungara Esperanto-Asocio kaj Landa (hungara) Konsilio de Sindikatoj, kun celo stimuli la uzon de Esperanto en la sindikata laboro. Tiun iniciaton oni ligas al la pli frua kreiĝo de la brita sindikata E-movado TUCEG.

Informado

- Svedio, la lando de la 65a UK en 1980, sendube havas modele organizitan informadon pri Esperanto. Sveda Esperanto-Federacio inaŭguras ĉiun kursosezono per iu nova, kutime moderna grafike kaj trafa tekste, informilo. Ĉi-foje temas pri *Esperanto idag* (Esperanto hodiaŭ), serio de 6 grandaj dukoloraj afiŝoj (100 x 70cm), kiuj per si mem konsistigas malgrandan ekspozicion pri la lingva problemo kaj Esperanto. La afiŝojn pretigis Franko Luin, profesia reklamgrafikisto kaj respondeculo pri informado ĉe SEF.

Interlingvistiko

- La 3a Interlingvistika Laborkonferenco okazis en Paderborn (FR Germanio) inter la 23a kaj 26a de novembro 1978. Sub la titolo "Interlingvistiko en scienco kaj klerigo", la konferenco traktis precipe la elementlernejan instruadon de la Internacia Lingvo. Oni analizis



tute freŝajn rezultojn de la ĵus finiginta eksperimenta instruado de Esperanto en tiu regiono. Ĉefe temis pri la influo de la lernado de Esperanto al la rezultoj en aliaj studobjektoj. Montriĝis, ke tiu influo estas rimarkinde pozitiva kaj ni esperas foje povi pli detale prezenti tiujn rezultojn. (Foto de D. Smolić).

Tradukoj

- La fama romano de Varankin, *Metropoliten*, kiun en 1977 reel-

donis TK kaj nun distribuas la Libroservo de UEA (broŝ. 24,00; bind. 32,70 gld.), baldaŭ aperos en la angla traduko de Martha Evans, kun ampleksa postparolo (pri Esperanto) de William Auld. La libron eldonos denove TK, ĉar la eldonisto estas "ravita de tiu originala romano en Esperanto".

Prelegvojaĝoj

- D-ro Albert Goodheir, Esperanta poeto el Skotlando (*Merlo sur menhiro*) kaj vigla eldonisto de Esperantaj libroj (Eldonejo Kardo, Glasgovo), meze de decembro prelegvojaĝis en Belgio kaj Nederlando.

Filatelio

- La 63a UK revekis la plurjare dormintan tradicion de speciala poŝtmarko de la kongreslando pri la UK. Tiu tradicio ankaŭ daŭras ĉe la 64a UK en Lucerno. La svisa poŝto eldonos Esperantan poŝtmarkon la 21an de februaro, kiel parton de la unua filatela serio de 1979. La valoro (0,70 svisaj frankoj) taŭgas por afranko de poŝtkarto al eksterlando. Laŭ detalaj planoj de LKK, la poŝtmarko estos aĉetebla dum la Kongreso en pluraj filatelaj variantoj (unua-tagita koverta k.s.). Diference de la bulgara poŝtmarko pasintjare, la svisa aperos en multmilionda eldonkvanto.

Persone

Fighiera-Sikorska

- Komence de ĉi tiu jaro, s-ino Ada Fighiera-Sikorska, redaktorino de *Heroldo de Esperanto*, forlasos Bruselon kaj translokiĝos al Madrido, kie ŝia edzo ricevis novan postenon. Kompreneble, tio signifas, ke ankaŭ la redakto de *Heroldo* baldaŭ havos novan adreson en la hispana ĉefurbo. Tamen, provizore restas valida la ĝisnuna adreso en Belgio, kiun vi trovas en anonco en ĉi tiu numero de nia revuo.

Starr

- La 21an de oktobro 1978, en la hotelo "Roosevelt" en Nov-Jorko, okazis solenaĵo honore al s-ro Mark Starr. La aranĝon organizis liaj kunlaborantoj en la sindikata movado kaj la Liberala Partio de Nov-Jorko. S-ro Starr estas vaste konata en la

sindikata movado kiel edukisto. Dum 25 jaroj li estis Nacia Kleriga Direktoro en la Internacia Sindikato de Laboristoj pri Virinaj Vestaĵoj. Inter la invititoj al la solenaĵo troviĝis pluraj anoj de la Esperantomovado en Nov-Jorko, kie s-ro Starr, cetere Honora Membro de UEA, estas oficiala reprezentanto de la Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj.

Tonkin

- Antaŭ la kutima januara kunsido de la Estraro de UEA en Roterdamo, d-ro Tonkin faros mallongajn vizitojn al Parizo kaj Genevo, kie li planis plurajn renkontiĝojn kun funkciuloj de internaciaj organizaĵoj, kun kiuj UEA jam kunlaboras aŭ ŝatus starigi pli intimajn rilatojn. La vizito al Svislando havas kiel celon, krome, pli detalan informiĝon pri la preparlaboroj por la 64a UK en Lucerno.

ADRESO DE ĈEFDELEGITO POR USONO

Kiel jam anoncote en la novembra numero, la nova ĉefdelegito kaj kotizperanto por UEA en Usono estas s-ino Bonnie Helmuth. Ŝi nun havas jenan konstantan adreson por UEA-aferoj: Box 2615, La Jolla, CA 92038.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Argentino: Hugo A. Lingua. Kanado: D. Massey-Price.

SOCIETO ZAMENHOF 1978

JAP: 218 Saburo Yamazoe.

SOCIETO ZAMENHOF 1979

NOVZ: 1 Jeanie Wilson. BRIT: 2 John Brownlee. FR GERM: 3 Louis Beaucaire; 4 Martin Gründler; 5 W. von Waldowski; 6 M. von Waldowski;

7 Marie Laade. BELG: 8 E.L.M. Wensing. DANL: 9 P.O.P. Andersen. NED: 10 E.S. Otto. NOR: 11 Agneta Anjer; 12 Ludwig Anjer. SVISL: 13 Hélène Raymond; 14 Frieda Welter. US: 15 Cecilia Peterson; 16 Catherina L. Schulze; 17 William H. Schulze.

DONACIOJ 1978 (Gld.)

ĝis la 30a de novembro

FONDAĴO CANUTO: FR Germanio: M. Laade 400,00. Sumo ĉi-jara: 2 551,12.

ĜENERALA KASO: Belgio: J. Verstraeten 70,00. FR Germanio: Maria Laade 440,00; E. Pfefferkorn 10,80; M. Grundler 53,98; A. Garcia 30,23. Kanado: B. Salt 1 658,00. Nederlando: O. Hoekstra 100,00. Diversaj malgrandaj: 14,97. Sumo ĉi-jara: 13 432,72.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

ekzameno



Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 24

(pri la demando vidu nian decembran numeron)

1. **Aviadiloj.** Jam en 1885 Ernest Archdeacon eksperimentis pri ascendoj en sferaj balonoj. Poste li konstruis diversajn aparatojn por aerveturado. En 1904 li kontribuis duonon de 50 000-franka premio por la unua unu-kilometra rondflugo per aviadilo. Henry Farman sukcesis fari tion en 1908.

2. **Biciklo.** Carlo Bourlet inventis la retropedaladon por la biciklo kaj okupiĝis ankaŭ pri bremsaj mekanismoj. Du aliaj frutempaj esperantistoj ligis Esperanton kun la biciklo. En 1896 Louis de Beaufront komencis informi francajn biciklistojn pri Esperanto kaj li petis la svedan aktivulon Valdemar Langlet traduki franclingvan velocipedan fakterminaron en Esperanton.

3. **Ĉevaloj.** Valdemar Langlet verkis du svedlingvaj librojn pri la regionoj, kiujn li vizitis surĉevale. *Till häst genom Ryssland* (Surĉevale tra Ruslando) estis eldonita en 1898 kaj *Till häst genom Ungern* (Surĉevale tra Hungario) aperis en 1934.

4. **Ruldomo.** Tra *Usono kun ruliĝanta hejmo* de Joseph R. Scherer estis publikigita en 1937. La aŭtoro vizitis 40 ŝtatojn kaj faris 720 paroladojn pri geografiaj temoj, samtempe donante informojn pri Esperanto.

5. **Kamelo.** En la afrika dezerto Jean Ribillard estis meharisto, soldato rajdanta sur dromedaro. Tiu speco de unuĝiba kamelo estas konata en Nordafriko laŭ la araba nomo meharo. Ribillard detale priskribas la beston en sia verko, *Vagado sub palmoj* (1956, 1977).

DEMANDO 25

(la respondo aperos en nia februara numero)

La 25an de aŭgusto 1892 (la 6an de septembro laŭ la novstila kalendaro), d-ro Zamenhof sendis poŝtkarton al pionira esperantisto kaj skribis: "La maristoj havas por mi grandan signifon." Tiu ĉi demando ilustras, kiel la maro kaj la maristoj rolis en la historio de Esperanto kaj en ĝia literaturo.

1. Versajne la plej frua originala poemo en Esperanto uzanta la maron kiel simbolon estis verkita de familiano de d-ro Zamenhof. Kiu komponis la "Marŝo de maristoj", kies lastaj kvar verslinioj estas jenaj?

*Kaj tranĉas marondojn kuraĝe ŝipeto,
Al cel' difinita naĝanta,
Ĝin gvidas, inspiras ĝin verda steleto
Kaj kant' nia pri Esperanto.*

2. La poŝtkarto menciita en la enkonduko estis adresita al oficiro de milita maristaro. En *Fundamenta krestomatio* troviĝas lia traduko de "Ĉe l'maro" de Heinrich Heine. Kiu estis tiu maroficiro?

3. En kiu novelo de mondfama Nobel-premiito, tradukita en Esperanton de Kabe, maljuna gardisto de lumturo unu nokton forgesis lumigi la lanternon, kun la rezulto, ke ŝipo



rompiĝis sur sablaĵo, kaj la viro estis maldungita?

4. Ĉe la 63a Universala Kongreso en Varna okazis renkontiĝo de maramantoj, maristoj, velsportistoj kaj aliaj, kiuj okupiĝas pri la maro, cele al fando de faka asocio. Tio ne estas novaĵo en la historio de Esperanto. Jam antaŭ ĉ. 70 jaroj fondiĝis la unua faka organizaĵo de maristoj. Kiu iniciatis ĝin?

5. Laŭ *Plena ilustrita vortaro* hidrografio estas "la parto de geografio pritraktanta la maraferojn." Kiu estis la hidrografo kaj ĉefingeniero de la franca maristaro, kiu kompilis kun la helpo de kompetentaj fakuloj *Provo de marista terminaro*, eldonitan en 1908?

6. En 1951 aperis en Esperanta traduko libro priskribanta navigadon per floso trans Pacifiko de la okcidenta marbordo de Sudameriko al insuloj de Polinezio. Kiel titoliĝas la libro, kaj kiu gvidis la ekspedicion?

7. Esperantistoj ankaŭ kantas pri la maro. Du tiutemaj kanzonoj estas

aŭdeblaj sur bulgara disko eldonita en 1968. Ĉu vi scias la titolojn de la kantoj?

8. Kiu novelo originale verkita en Esperanto temas pri fiŝkaptista ŝipo, kiu malsukcesis atingi havenon antaŭ la estiĝo de ŝtormo en la Norda Maro: kaj "ĉi tiu monstro ... prenas ... ankoraŭ kvin viktimojn en la eterna lukto inter ĝi kaj la homaro"?

9. Diversaj sciencaj specialistoj okupiĝas pri la maro: oceanografoj, hidrografoj kaj marbiologoj. Unu el ĉi-lastaj estas planktonisto, kiu verkis libron en Esperanto pri sia fako. Kiu li estas, kaj kion li studas?

10. Kiu ŝekspira komedio, kies Esperanta traduko aperis en 1977, temas pri marvojaĝo de ĝemelaj gefratoj kaj ilia ŝiprompiĝo dum tempesto apud la marbordo de Ilirio?

Dek titoloj de TK/Stafeto

Ibsen: BRAND, drama poemo en traduko de E. Haugen. 353p. 21,00 gld.

Francis: LA GRANDA KALDRONO, originala romano. 592p. 42,00 gld.

Chiussi: JE LA FLANKO DE LA PROFETO, originala esearo pri Islamo. 362p. 33,00 gld.

Varankin: METROPOLITENO, originala romano. 252p. 24,00 gld.

Boatman: LA NEKONATA KONATO, originala romano. 121p. 6,60 gld.

Potts: LA NOVA BUTIKISTO DE NUKUGAIA, originala novelaro. 250p. 15,00 gld.

Gilbert: PLANLINGVAJ PROBLEMOJ. 98p. 10,50 gld.

Auld: PRI LINGVO KAJ ALIAJ ARTOJ, orig. esearo. 216p. 18,00 gld.

Tagor: PRIMICO, poemaro en traduko de P. Daŝgupto. 114p. 10,50 gld.

Heredia: LA TROFEOJ, poemaro en traduko de G. Waringhien. 220p. 12,00 gld.

LA LIBROSERVO DE UEA ESTAS ĈEFA DISTRIBUANTO DE ĈIUJ TK-ELDONAĴOJ.



Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,75 gld. (1 int. resp. kup.). Pri la enhavo respondecas nur la anoncantoj mem.

Por la prilaborata verko pri la esperantistoj, kiuj pereis en la hitleraj murduzoj kaj batejoj, bonvolu alsendadi ĉiujn informojn, priskribojn, dokumentojn. Adreso: W. Szczepański, ul. Odrodzenia 2, PL-89-210 Łabiszyn, Pollando.

Maristoj, vel-navigistoj, maramantoj! Vi estas petataj kontakti s-ron Peeter Aitai, Pärny Raj, SU-203661 Liu, Estonio, Soveta Unio. En preparo estas refondiĝo de la marista faka organizaĵo de esperantistoj. Instigu ankaŭ viajn konatojn-maristojn reagi al ĉi tiu anonceto.



Mehrdad Ghahreman, P.O. Box 1055, Mashhad, Irano.

22-jara irana fraŭlo serĉas geamikojn por korespondado tra la tuta mondo. Mi kolektas poŝtmarkojn pri ĉiuj temoj. Skribu al

Pri kulturo, lingvoj kaj literaturo deziras korespondi tutmonde profesoro Euclides Carneiro da Silva. Nepre respondas. R. Cap. Paulino Freire 366, BR-08700 Mogi das Cruzes (SP), Brazilo.

Se vi estas malnova membro de UEA, kio signifas ankaŭ fidela leganto de nia revuo, vi jam konas nian belan kutimon sendadi la revuon al ĉiuj malnovaj abonantoj ĝis inkluzive marto de la venonta jaro. Sed, ĉu tiu kredito vere estas necesa? Tiusence:

*Antaŭdankon
por la frua pago
de via kotizo
por la jaro 1979*

Nia klubo dezirus ricevi materialon en rilato kun "la Jaro de la Infano" de UNESKO: fotojn, infandesignaĵojn, ktp., por ekspozicio. Ni ŝatus ricevi ankaŭ turismajn flugfoliojn por disdoni al kursanoj. Rekompencos. Societo Esperantista de Lyon, 7 Rue du Major Martin, F-69001 Lyon, Francujo.

ALVOKO al ĉiuj Esperanto-grupoj: Dum la 39-a Hispana Kongreso de Esperanto, okazonta en Gijón (Asturio) en julio 1979, ni aranĝos specialan ekspozicion. Bonvolu sendi: komunan fotografaĵon de via grupo kaj individuajn fotografaĵojn de la plej elstaraj esperantist(in)oj kun koncizaj informoj pri ili. Sendu al: 39-a Hispana Kongreso de Esperanto, Grupo Esperantista JOVELLANOS, str. Enrique Cangas 25, Gijón (Asturio), Hispanio.

Laŭ e... fika maniero, 200-vorta erotologia terminaro + 100 maldecaj anekdotoj, 96p. broŝ. 9 gld. *Nova e... fiko*, simila enhavo, 96p., 9 gld. (Ambaŭ volumetoj kune binditaj: 21 gld.) Eldonis Ergoto. Mendeblaj ĉe UEA.

Glumark-kolektantoj! Post 25 jaroj mi retrovis stokon de Esperantaj glumarkoj, kiujn apenaŭ iu ajn posedas. Estas reklamomarkoj por la revueto *La Libersocio*, kiu aperis inter 1952/54. 1 folio = 1 int. resp. kup. plus 1 kupono por afranko de ĉiu sendaĵo. Neussner, Dominicusstr. 25, D-1000 Berlin 62.

Katolika studento pri filozofio kaj teologio: Edwin Switala, Kolonia 19, PL-14-520 Pieniezno, Pollando, volas koresp. precipe pri astronomio.



Esperanto en radio

Ĉiujn informojn pri radio bv. sendi al s-ro G. Larglantier (redaktoro de ĉi tiu rubriko), 29, Bd. Murat, F-75016 Paris, Francio. En la tabelo, la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn v. en la Jarlibro 1978, p. 66. **Mal-longigoj:** I = informoj, P = Parolado, K = kurso.

ĈIUTAGE

05.00-05.30 Varsovio, 200m (1502 kHz), 75.84m (3955 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27m (7270 kHz). I.P. Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00950 Warszawa, Pollando.

15.30-16.00 Varsovio, 41.99m (7145 kHz), 31.45m (9540 kHz). I.P.

21.30-22.00 Varsovio, 200m (1502 kHz), 75.84m (3955 kHz), 50.04m (5995 kHz), 41.27m (7270 kHz).

DIMANĈE

05.45-05.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), aŭ 16.82m (17840 kHz). I.P. ORF, Esperanto, Postfach 700, A-1041 Wien, Aŭstrio. Ripeto de la antaŭa sabata programo.

11.00-11.30 Pekino, 41.00m (7315 kHz), 30.44m (9860 kHz). I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Popola Respubliko Ĉinio.

12.30-13.00 Pekino, 25.04m (11980 kHz), 19.90m (15080 kHz). I.

17.20-17.30 Lisbono, 19.56m (15340 kHz), 16.78m (17880 kHz). I.P. Radio Difusão Portuguesa, Esperanto, rua do Quelhas, Lisboa 1, Portugalio.

18.20-18.30 Lisbono, 49.79m (6025 kHz), 30.80m (9740 kHz). Kiel je 17.20.

20.00-20.20 Romo, 41.24m (7275 kHz), 41.15m (7290 kHz), 31.33m (9575 kHz). P. Radio Roma, Esperanto-Fako, Casella Postale 320, I-00100 Roma, Italio.

20.05-20.15 Vatikano, 196m (11709 kHz), 48.47m (6190 kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 31.10m (9645 kHz), 25.63m (11705 kHz), 19.84m (15120 kHz). I.P. Radiovaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.

20.50-21.00; 21.20-21.30; 21.50-22.00; 22.20-22.30 Lisbono, kiel je 17.20.

23.00-23.15 Rio de Janeiro, 214m

(1400kHz). P. Brazila Spiritisma Federacio, av. Passos 30, Rio de Janeiro, Brazilo.

LUNDE

00.00-01.00 Sorocaba, 278m (1080 kHz). I.K. Rádio Clube de Sorocaba, rua São Bento 190, BR-18100 Sorocaba (SP), Brazilo.

01.20-01.30 Lisbono, 31.14m (9635 kHz), 25.34m (11840kHz).

02.50-03.00 Lisbono, 25.26m (11875 kHz).

03.20-03.30 kaj 05.20-05.30 Lisbono, 49.79m (6025kHz), 25.14m (11935kHz), kiel dimanĉe.

18.00-18.15 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66 (6165kHz), 31.46m (9535kHz). P. Svisa Radio Internacia, Esperanto-Fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.

22.05-22.15 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66 (6165kHz), 31.46m (9535kHz), 25.60m (11720kHz), 25.27m (11870kHz), 19.69m (15235kHz), 19.60m (15305kHz).P.

MARDE

20.30-20.45 Ibra Radio, per ondoj de Radio Mediteranea en Malto:

49.92m (6010kHz). I. Ibra Radio AB, S-105 36 Stockholm, Svedio.

22.45-23.00 Zagrebo, 264m (1163 kHz).P. Radio Zagreb, Esperanto-fako, Zagreb, Jugoslavio.

MERKREDE

22.00-22.15 Sabadell, 203m (1475 kHz). I.K. Radio EAJ 20, Sabadell, Hispanio.

ĴAŬDE

17.50-17.55 Vieno, 203m (1475kHz).I.

18.00-18.15 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

22.05-22.15 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

VENDREDE

20.00-20.30 Pekino, 43.73m (6860 kHz), 31.98m (9380 kHz), 26.09m (11500 kHz). I.

20.30-20.45 Valencio, 358m (836 kHz).P. La Voz de Valencia, av. del Cid 154, Valencia 14, Hispanio.

SABATE

11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.

12.00-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.

16.45-16.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 19.86m (15105kHz). I.P.

18.00-18.15 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

20.00-20.30 Pekino, kiel vendrede.

22.05-22.15 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

ĜENERALA AŬDEBLECO

Ne estas eble certigi, ke iu elsendo estas aŭ ne estas kaptebla en difinita lando aŭ mondparto. Tro multe da daŭraj aŭ nedaŭraj cirkonstancoj influas la propagadon de ondoj: atmosfera stato, sezono, parto de la tago, geografia ĉirkaŭaĵo de la aŭskultanto, tipo de la ricevilo kaj de la eventuala anteno ktp. Jen tamen kelkaj ĝeneralaj indikoj.

a) Direktitaj ondoj. **Berno:** 11720, 11870, 15235 kaj 15305 kHz al Afriko; 15305 kHz al Suda Ameriko; 3985, 6165 kaj 9535 kHz al Eŭropo. **Lisbono:** 15340 kaj 17880 kHz al Afriko; 9635 kaj 11840 kHz al Brazilo; 6025 kaj 11935 kHz al Norda Ameriko; 11875 kHz al Suda Ameriko; 6025 kaj 9740 kHz al Eŭropo. **Pekino:** 7315 kaj 9860 kHz al Japanio kaj Koreo; 11980 kaj 15080 kHz al Sudorienta Azio; 6860, 9380 kaj 11500 kHz al Eŭropo. **Vatikano:** 9625, 11705 kaj 15120 kHz al Afriko; 6190, 7250 kaj 9645 kHz al Eŭropo.

b) Nedirektitaj ondoj kapteblaj longdistance: **Ibra Radio, Romo, Varsovio, Vieno, Zagrebo.**

c) Nur loka aŭskultebleco por **Rio de Janeiro, Sabadell, Sorocaba, Valencio.**

Viaj leteroj al la redakcioj de la Esperantaj radio-elsendoj estas la sola signo pri la populareco kaj dezirindeco de tiuj elsendoj.

AL VI DE MI



ALBERTA CASEY, el La Jolla, Kalifornio, jam pensas pri sia dua gramofondisko en Esperanto. Ĉu vi konatiĝis kun la unua – "Al vi de mi"? Ĝi nun haveblas ankaŭ kiel sonkaseto. Plia novaĵo pri tiu sukcesa disko (kaj kaseto) estas, ke la Libroservo de UEA fariĝis la ĉefa distribuanto de tiu eldonaĵo kaj donas 33-procentan rabaton ĉe aĉeto de minimume 3 ekzempleroj. Cetere, vidu la recenzon en nia marta numero pasintjare kaj vi konstatos, ke "Al vi de mi" estas la plej malmultekosta el la bonaj grandformataj diskoj: 18,00 gld. por la disko; 15,00 gld. por la kaseto. Ne atendu elĉerpiĝon! Mendu tuj ĉe la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

ROMULO GALLEGOS:

DOÑA BÁRBARA

unu el la plej famaj sudamerikaj romanoj en la traduko de Fernando de Diego. Caracas: Venezuela E-Asocio, 1975. 264p. 21cm. ISBN 84 399 2885 8. 16,20 gld. Nun kun 33% rabato ĉe la Libroservo de UEA!

"Granda kvalito de la verko estas la perfekteco de la lingvo. Estas malofta plezuro legadi paĝojn post paĝoj de interesa verko kaj ne esti ĉiupaĝe haltigata de malkorektaĵo, misuzo de vorto aŭ alia lingva difekto. La traduko estas rara juvelo, de kiu ekzistas en nia literaturo tre malmulte da ekzemploj" Gaston Waringhien

Pensu pri beleco

uzante sur viaj korespondadoj la allogan trikoloran glumarkon! Cent markoj kostas 8,25 (por Nederl. 9,60) gld., kio inkluzivas la sendokostojn.



Mendu ĉe via libroservo aŭ ĉe la Libroservo de UEA, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederl.

HEROLD DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 58 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 17 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Junulara, instruista, literatura rubrikoj, librorecenzoj, listo de fakaj artikoloj en Esperanto
- Duobla Kongresa numero, kalendaro de internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj
- Libera Tribuno de la legantoj, anoncetoj, ŝak-problemoj, krucvortenigmoj, foto-filmo
- Literatura kaj scienca suplementoj

Jarabono: 440 belgaj frankoj aŭ egalvaloro.

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA (30,00 guldenoj; por Nederlando 31,20 gld.)

Mendu provnumeron ĉe la redakcio: Rue de la Reinette (Pippelingstraat) 13, boîte 28, B-1000 Bruselo

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

Kvalito konkeras la mondon

Trajnoj, ŝipoj kaj aviadiloj transportas 70% de la produktoj de Agfa-Gevaert al ĉiuj landoj de la mondo. Reto de pli ol 150 reprezentantoj zorgas pri la posta distribuo de la

produktgamo. Ege diversa asortimento kun unu komuna eco: kvalito. Pro tio la nomo Agfa-Gevaert ade pli vaste konatiĝas: inter foto-amatoroj kaj presistoj, samkiel inter inĝenieroj, medicinistoj kaj

komercistoj. Inter miloj da specialistoj en la tuta mondo.

Agfa-Gevaert N.V.
B-2510 Mortsel (Belgio)

